6-a Jaro. N-o 286 APERAS  SEMAJNE Leipzig, 27./3. 1930

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Kolmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerfiner

MILITA INDUSTRIO

Unu flanko de la milita problemo estas la materia fariĝo, alia — la psika eblo de la milito. Klarigo por la dua demando estu serĉata en la psika temperamento de individuo k amaso; la unuan problemon oni povas kompreni el la socia strukturo mem. Kaj kiu neas, ke tiel la psika temperamento de homo k amaso, kiel la strukturo socia fine kune estas difinataj de potencsugesto k potencproporcioj?

Do, se ni volas ekkompreni la militon, kiel socian aperaĵon, tiam estas gravege, ke ni atentu la potenc-proporciojn nunsociajn. Estas sekve la demando: Kiel do la grupoj rilatas inter si, kiuj povas decidi pri paco aŭ milito?

Ĉu oni devas serĉi la kaŭzon de l' milito nur ĉe la kapitalismo, aŭ ĉu nur ĉe la ŝtato, aŭ ĉu nur militarismo sola estas kulpa? Kie troviĝas la limoj inter tiuj ĉi apartaj potencosferoj? La fiksa ideo, ke la ŝtato suverenas, ne estas tenebla. Kie la ŝtatoj suverene decidis? Ĉu en Francio k Usono, kie la popoloj ekmilitis por la interesoj de la armadindustrio, k kie la kredo al la pacifistaj programoj de iliaj regantoj ankoraŭ plifortigis ilian volon al batalo?

Ĉu en Usono, kie la bankoj, se necese, gardataj de la ŝtato, prenis sur sin la administradon de la boliviaj impostoj, kie la politiko de Kubo k Sankta Domingo estas ordonita de la usonaj bankoj k sukerindustrio, dum eksteren la sendependeco de tiuj ĉi ŝtatoj estas daŭrigata? La ŝtato neniam povis kontraŭstari al la premo de en- k eksterlandaj industriaj k financaj potenculoj.

Kaj jen kiel la grandindustriistoj k bankoj akiris superregadon, daŭre plifortiĝantan. Oni povus diri, ke ŝtato k militarismo nur ekzistas por ornami la interesbatalon de la grand-industriistaj grupoj k bankoj, ideale k romantike. Sed ankaŭ la batalo pro interesoj estas tre relativa. Per trustiĝo, interŝanĝo de akcioj ktp. tiu ĉi batalo multokaze jam fariĝis . . . kunfandiĝo de interesoj.



Fama desegno de Vilet (Willette).
— *Silentu, he, ilaĉo!*

Antaŭ kelka tempo oni povis legi en la gazetaro, ke la Ŝel (*Shell*)-grupoj posedas 25% el la akcioj de la societo, kiu klopodas, laŭ la *Bergius*-procedo, produkti petrolon el karbo, k la klopodoj de Ŝel k Standard Oleo (*Standard Oil*), reguligi inter si per interkonsento la oleproduktadon, estas jam tro konataj.

Oni ne forgesu, ke petrol- k milit-industrioj ne estas disigeblaj. Ĉe la Anglo-Persa Kompanio (*Anglo-Persian*), starigita en 1905, dekomence la angla registaro estis reprezentata de subadmiralo Sled (*Sir Edmond Slade*) k Lordo Inĉkep (*Inchape*), por la interesoj de la angla militŝiparo. Oni tion konsideru, ke ĉiuj tankoj k militŝipoj ne povas malhavi petrolon k ke laŭ Ĉemberlen (*Chamberlain*) la Ententa Ligo venkis en la lasta milito per torentoj da petrolo. Tiu samiĝo de interesoj estas ankaŭ rimarkebla en la industrio, kiu pleje ŝajnas esti dependa de la agado de unuopa ŝtato, nome la milita industrio. Kiom nacieca, kiom patriama estas tiu industrio, evidentiĝu ĉi sube:

En la Unuigita Harve-Ŝtal-Kompanio (*United Harvey Steel Cie*), ĉiuj grandaj fabrikistoj de kirasplatoj k kanonoj kunlaboris, nome Vikers k Armstrong (*Vickers & Armstrong*), Anglio, Betlehema Ŝtal-Kompanio (*Bethlehem Steel Cie*), Usono, Ŝneder-Kreŭzo (*Schneider-Creusot*), Francio, Krup (*Krupp*), Germanio, Dilinger Hite (*Dillinger Hütte*), Germanio,

parte franca kapitalo, k la *Societa degli Alti Forni Fondieri Acciaino di Ferni*, Italio. Krom tio Krup estis speciale interesita pere de la aŭstria Skoda k la rusaj Putilov-fabrikoj ĉe Ŝneder-Kreŭzo. Vikers k Armstrong havigis la duonon de la kapitalo por la platofabrikoj Muluran en Japanio. La materialo por la germana militŝipa konstruado troviĝis ĉe la Marine-Verŝtendigungskoncern (*Verständigungskonzern*), kiu ĉe ricevo de 10% de la tuta elspezsumo dividis la mendojn inter la diversaj societoj.

Jam en j. 1905 la Germana Armil- k Munici-fabrikoj en Berlino k Karlsruhe, la Pafilfabriko "Maŭzer" (*Mauser*), la belga Nacia Militarmila Fabriko (*Fabrique nationale d'armes de guerre*) k la Aŭstria Armilfabriko-Kompanio faris interkonsentojn por liverado de pafiloj k karabenoj al Rusio, Ĉinio, Japanio k Abesinio, per kiuj la kontraktintaj firmoj prenis sur sin la devon pagi por ĉiu de ili farita pafilo aŭ karabeno 15 frankojn al komuna de ili starigita kapitalprovizo, dum la gajno laŭ antaŭe decidita skemo estos dividata.

El la supraj linioj evidentiĝas, ke ankaŭ la liverado estas internaciiĝinta, tiel ke en 1916 dum la batalo en la Dardaneloj la angloj estis kontraŭbatalataj per kanonoj liveritaj de anglaj firmoj, kaj anglaj ŝipoj eksplodis sur anglaj marminoj. Krup, oficiro de la franca honorlegio, liveris siajn kanonojn al 52 diversaj nacioj, tiel ke dum la milito inter Rusio k Aŭstrio oni ambaŭflanke pafis per Krup-kanonoj. La patento pri la kirasplatoj vendiĝis al usonaj firmoj, pro kio la usona registaro ilin multe malpli kare povis aĉeti ol la germana.

Dume la milit-industrio kronas sian internacian tendencon per la detruo al germanaj submar-boatoj pere de en Germanio fabrikitaj aeroplanoj, ke pere de la grenadbruligilo de Krup, kies patento, vendita al Vikers k Armstrong, havigis al ĝi 60 markojn germanajn por ĉiu mortigita germano.

Sed ankaŭ en aliaj kromaferoj de la milita industrio la patriamo, dum la milito, ne estis facile trovebla. Ĉiumonate oni transportis el Germanio al Svedio 150 000 milkilogramojn da ferminaĵo, parte al Svisio, kie estis specialaj fabrikoj por forigi la germanajn fabrikmarkojn, antaŭ ol transsendi la materialon al Francio. En tiu sama tempo mankis ferminaĵo por la bezonoj de la germana armeo.

La sveda-angla dinamit-trusto estis en 1914 tiom forte organizita, ke en la germana gazetaro aperis alvoko por interŝanĝi la akciojn por akcioj de la Dinamit-Akcia Societo, antaŭe *A. Nobel* k Ko, Hamburgo. En tio la Nordgermana Banko, Diskonto Societo, Bankunuiĝo de A. Ŝafhaŭzen *(Schaaffhausen)* k Bankinstituto A. Levi (Bankhaus A. Levy) kunhelpis. En 1915 la internaciaj ĉefoj de la dinamita trusto renkontiĝis senĝene en Londono, kun scio k aprobo de la registaroj, por ordigi siajn aferojn; k evidentiĝis en tiu konferenco, ke la kontraktoj inter la anglaj k germanaj dinamitfabrikoj, ankaŭ dum la mondmilito, ne estis rigardataj kiel "senvaloraĵoj". Ke ankaŭ la venengasindustrio internacia estas organizita, estas konate. La I. G.-Farbindustrio en Germanio i. a. konstante interrilatas kun aŭstraj, francaj, italaj, anglaj k japanaj societoj, kiuj aŭ konstante, aŭ kiel la artefarita silk- k samspeca sterko- k kemi-industrioj certe en la milita tempo povas esti transformataj en milit-industriojn.

Oni ne forgesu, ke la mondtransporto de armiloj k municio dum 1926 sumiĝis je 58 157 366 da dolaroj, en kiu sumo Germanio partoprenis je 12,1%, Usono je 18,1%, Anglio je 25,5% k Francio je 10,3%. Tie ĉi oni sole profitas je la milito. Kaj ĉu la registaroj faruŝ klopodojn por malebligi tion?

En 1913 la ĵurnalo *Ekonomisto* (Economist) devis konfesi, ke la angla registaro estis deviginta sin havigi al Vikers k Armstrong mendojn de alinaciaj registaroj; en Francio Ŝneder k Kreŭzo prizorgis la elekton de la ministro por maraj aferoj; en Rusio estis inter la fakmilitistoj ne malmultaj agentoj de eksterlandaj armilfabrikoj; en Germanio parencoj de la plat-reĝo Ŝtum (Stumm) okupis ĉiujn postenojn en la ministerio por eksteraj aferoj. Kaj ankoraŭ nuntempe oni miras, aŭdante ke Ŝirer (Shearer) komisie de la Betlehema Ŝipkonstrua Korporacio (Bethlehem Shipbuilding Corporation) k la Njuport Njuz Ŝipkonstrua k Sekdoka Korporacio (Newport News Shipbuilding & Drydocks Corp.) en 1927 provis influi la malarman konferencon en Ĝenevo en por nomitaj societoj favora senco. Flanke de la packonferenco estis en tiu sama urbo kunveno de la internacia milita industrio, kies internacieco jam eltenis pli da provoj ol tiu de la Ligo de Nacioj.

Ni do vidas, ke kvazaŭa triunuo el ŝtato, kapitalismo k militarismo, nedisigeble inter si ligitaj, puŝadas al la milito. Pro tiu kaŭzo batalo kontraŭ kapitalismo sola, kiel kontraŭ surkreskaĵo, estas kondamnata al pereo. Nur en sia reciproka interligo tiuj ĉi potencoj povas celtrafe esti kontraŭbatalataj, k la batalo kontraŭ la potencpozicio de grandindustrio k ŝtato certe ankaŭ ne devas esti malatentata en la *batalo kontraŭ la milito.*

El nederl. soc. gazeto "Bevrijding" (Liberiĝo) trad. Prad Bout (15 396).

Kiu kaj kial likvidas preĝejojn en USSR?

(Fino. Vidu antaŭan n-on)

Kelkaj faktoj

En Fomina rajono[1] de Muroma distrikto en Niĵni-Novgoroda lando efektiviĝas kompleta mastrum-kolektivigo. La kamparanoj en tiu regiono, kolektiviĝante decidis likvidi ĉiujn preĝejojn, ekzistantajn sur la rajona teritorio (16. 2. 30).

En Novoĥoperska rajono, komplete kolektiviĝinta (Borisoglebska distrikto), la kamparanoj likvidis jam 65% da preĝejoj. Membroj de l' terkultura kolektivo "Druĵnik rebjata" (Solidaruloj) en Kolenova rajono 3-an de febr. forigis el siaj domoj ĉiujn ikonojn[2].

En Krasnoborska rajono de Norddvina distrikto laŭ postulo de kamparanoj estas likviditaj du preĝejoj. Dum proksimaj tagoj sammaniere estos likvidata preĝejo en Derevenska vilaĝo, kie pastroj abdikis sian rangon. Malriĉul- k mez-kamparanoj jam postulas likvidi ĉiujn preĝejojn en la rajono.

Preskaŭ el ĉiuj rajonoj de Kostroma distrikto venas informoj pri amasa likvido de preĝejoj pro disvolvo de l' kolektiviga konstruado. En sola Krasnoselska rajono dum januaro estis likviditaj 5 preĝejoj, el kiuj 2 en vilaĝo Krasnoje. La likvido estas efektivigata laŭ postuloj de kolektivanaro, rezoluciantaj pri tio en siaj ĝeneralkunvenoj (ĵurnalo "Severnaja Pravda", 18. 2.).

La kamparanoj de l' vilaĝo Prokrovskoje (Kozlova distrikto) decidis transdoni la preĝejon por infanvartejo de l' terkultura kolektivo. Aliĝante al kompleta kolektiv-mastrumado la kamparanoj el 8 vilaĝoj, unuigataj de Bogoljubova soveto, unuanime decidis likvidi preĝejojn en vilaĝoj Bogoljubovo k Novikovo k transdoni ilin al kulturaj institucioj. En vilaĝo Ĵabino de Ranenburga regiono la kamparanoj en ĝenerala kunveno unuanime brue aplaŭdantaj decidis likvidi molokanan (sektanan) preĝejon k transdoni ĝin por klubo. La kunveno transformiĝis poste en vastan kontraŭreligian manifestacion, partoprenatan de pli ol 1500 homoj. La kolektivanoj kolektis ĉiujn siajn ikonojn, kunportis ilin al la lago k forbruligis ("Naŝa Pravda", Kozlov, 13. 2.).

Granda entuziasmo regas amasojn

[1] Administra subdistrikto.
[2] Sanktulaj statuetoj.

Korekto. En n-o 284, p. 271, 1-a kolono, linio 22 de malsupre, necesas legi *kajuto* (anstataŭ "kabino").

laborulajn. La Unio de Agitantaj Ateistoj, libervola organizo, eĉ tute ne sukcesas ĉirkaŭpreni la tiom kreskantan ateistan movadon. Dum lasta duonjaro la ateista organizo kreskis de 700 mil membroj ĝis 2 milionoj (1. 2.). Nun la Unio kalkulas proksimume 3 milionojn da membroj. Por montri, kiom rapide k entuziasme kreskas la ateista movado, ni menciu nur du-tri malgrandajn faktojn.

Kiam antaŭ du monatoj en Ukrainio, en urbo Artemovsk la laboristoj en granda manifestacio likvidis k transdonis preĝejon k sinagogon, samtempe aliĝis al la ateista organizo ĉ. 10 mil novaj membroj.

Dum la kontraŭkristnaska agitado en urbo Penza estis fondataj 35 novaj ĉeloj ateistaj. Al la Ateista Unio aliĝis 2200 novaj membroj. La Penza-a ateista organizo pli ol duobliĝis.

Nordkaŭkaza lando en j. 1929 havis 18 mil organizitajn ateistojn. Dum 1. februaro nunjara ĝi jam havis 87 mil membrojn. Zamoskvorecka sektoro en Moskvo havis en fino de 1929 6250 membrojn-ateistojn k nun 24 mil. Tuta Moskva lando en urboj k vilaĝoj havis dum 1. julio 1929 65 mil organizitajn ateistojn k nun jam 245 mil.

En la vicoj de Unio de Agitantaj Ateistoj (UMA) estas ĉ. 50% da laboristoj, ĉ. 30% da laboruloj-kamparanoj k 20% da oficistoj. Pli ol duono el la UMA-anoj estas senpartiaj, ne apartenas al la komunista partio aŭ junularo. 20% estas virinoj.

Jen la faktoj, kiuj montras, ke tute malestas en Sovetio iuj persekutoj al religianoj. La ekonomiaj kaŭzoj senreligiigas laborulajn amasojn, kiuj libervole forĵetas ĉion, kio malhelpas al ili sukcese atingi plenan liberon, konstruante la socialismon.

Ĉi tiu liberiĝo efektiviĝas sendube en la kruela klasbatalo: la *kulakoj*,



La papo predikas la krucmilit-iron kontraŭ Sovetio

novburĝaro, caraj eksĝendarmoj k pastroj ĉiuspecaj kruele kontraŭbatalas tiun liberiĝon. Sed tiurilatan respondon al niaj korespondantoj mi pritraktos en alia artikolo.

N. Incertov (259).

La respublikŝirma leĝo

Preskaŭ ĉiu laboristo scias, ke la germana laboristaro, sub Vilhelmo I, spertis la kontraŭsocialistan leĝon de la kanceliero Bismark (Bismarck), kiu malleĝigis la tiaman socialdemokratan partion, k subpremis ĉian liberemon de l' proletaro. Nun en la "libera" respubliko Germanio oni pretigas similan leĝon. Jen kelkaj faktoj: Dum 12 jaroj de la kontraŭsocialista leĝo oni verdiktis 1000 jarojn da malliberigo al 1500 personoj. Dum 7 jaroj de la *unua* respublikŝirma leĝo estis verdiktataj *6000* jaroj da malliberigo al minimume triobla nombro da laboristoj. Kelkmil laboristoj estas mortigitaj k vunditaj de la polico k regna militistaro. Faŝistoj k naciistoj rajtas mortigi k bati laboristojn; ilin nenia puno trafas. Mi povus citi multajn faktojn, sed tio plenigus broŝuron. Tial bonvolu kredi la nudajn nombrojn. Sed nun pretiĝas la "2-a respublik-ŝirma leĝo".

Kia ĝi estos? — Ĉu ĝi kontentigos la laboristojn? Mi asertas la malon! Ĝi nur direktos sian pinton kontraŭ la revolucia laboristaro k ĉefe la kom. partio. Mi ne volas citi la tutan paragrafaron, sed resumu koncize: La leĝo permesos: 1. revenon de l' eksimperiestro Vilhelmo II; 2. la cenzuron je kunvenoj, gazetoj, libroj k bildoj. Ĝi malpermesos agi aŭ punos tiujn, kiuj apartenas al neleĝa aŭ kontraŭŝtata organizo (legu: kom. partio), kiu celas subfosi k renversi la respublikan ŝtatformon; ĝi punos tiujn, kiuj ne estas toleremaj al la agoj de la registaro aŭ

KULTURTASKOJ

M. Krjukov

(6-a daŭrigo. Vidu n-ojn 279/85)

7. 3. Ne ķultigi sporton, kiu fakte estas burĝa rimedo por forgesigi k dolĉigi punlaboron en fabrikoj k minejoj. Ĝi kaŭzas nekalkuleblan malŝparon de gejunula energio utiligebla pli racie. Sportismo kiel religio detenas de sociaj k prispiritaj zorgoj en la plej perfekta maniero. La korpkulturo kiel spiritkulturo povas k devas disvastiĝi en kondiĉoj de ĉiutaga vivo k laboro estante utiligebla k alloga. Penu aranĝi korplaboron ĉie en laborejoj k lernejoj tiel ke ĝi, estante alloga, konformu al inklinoj k bezonoj de aĝo k efiku sur korpon kiel science planita gimnastado. Nuna proletsporto estas nur provizora vole-nevola anstataŭo de tia laboraranĝo.

7. 4. Akcelu nudismon de grado al grado. Nuna kultura homo tro kutimiĝis vivi en artefarita medio (arte konservata konstanta temperaturo de domo, artefarita kromhaŭto — vesto ktp.). La homo malutile trodelikatiĝas k tre riskas transformiĝi en domportantan beston, kiu mortas tuj, kiam ĝi restas ekster sia dometo kiel kunkonka limako. Ĉi tiu punkto same rilatas al higieno kiel al eduko.

8. En moroj k kutimoj

8. 1. Malsamaj moroj k kutimoj tre malhelpas tuthomaran vivon k fremdigas popolojn. Nia tasko estas laŭeble raciigi k unuigi ilin sur bazo de sennacieca kulturo, kiu nepre superas la nacian. — Ekstera aspekto de homo, se ĝi estas nekutima, tre fremdigas ĝin. Krom tio estas ĉie konata fakto, ke diferenco en kostumoj ĉiam k ĉie montras diferencon en kultura k socia stato. Ĝi rilatas same al klasoj, seksoj k individuoj kiel al nacioj k popoloj. Tial via kostumo estu kiel eble plej *racia* konforma al laŭgradaj postuloj de nudismo, unuigita k sama por viroj k virinoj[1]. For diversaj belaĉaj naciaj ĥalatoj, burnusoj, ĉapegoj, pantalonegoj ktp.! For malhigienaj k klopodigaj longaj haroj de virinoj! For rigidigaj amelitaj kolumoj, prahistoriaj korpornamoj — ringoj surbrakaj, surfingraj, enorelaj, naztruaj! Plej oportuna, higiena, racia k tial bela estas tre disvastigita tuteŭropa mola ĉapelo (en malvarmo rustipa ĉapo), palto, jako aŭ ĉemizo uzata kun kravato laŭ angla aŭ rusa maniero (t. e. faldata en- aŭ surpantalone).

8. 2. Akcelu unuigon de uniformoj de ĉiuj publikaj servistoj (fervojistoj, tramistoj, poŝtistoj ktp.), por ke ili estu egalfacile rekoneblaj en ĉiuj landoj de la mondo.

8. 3. Ju pli kolektiviĝas la vivo, des pli grandiĝas interrilatoj de homoj k des pli ĝenaj, malhigienaj k malutilaj iĝas multaj kutimoj, ekz. diversnaciaj salutmanieroj, manpremoj en grandaj kunvenoj. Krom tio tre ĝenas ilia malsameco: eŭropanoj manpremas, senĉapeliĝas, ĉinoj ĉe renkonto kaŝas manojn post dorso, hebreoj por montri respekton kovras kapon ktp. Uzu solan por ĉiuj landoj salutmanieron, ĝi estu la bone konata mallonga vorto *salut'* akompanata de manlevo (egale por renkonto k disiĝo) k en konformaj okazoj la vortoj: *adiaŭ, ĝis revido, bonvenon* ktp.

8. 4. Akceli korpbruligon anstataŭ

[1] La saman egaligon de seksoj akcelu en lingvo, uzante nomojn de profesiulinoj sen la sufikso -in (filozofo, doktoro, instruisto anstataŭ filozofino, doktorino, instruistino).

prezidanto, k tion publike riproĉas, ĉu buŝe aŭ skribe (Jen, komunistaj oratoroj, redaktoroj ktp., sed ankaŭ la simpla laboristo, povos malliberiĝi). Polico povas malpermesi aŭ ĉesigi kunvenojn, se la paroladoj ne plaĉas al ĝi. Gazetojn, librejojn, presejojn povos konfiski la ŝtato. Kiu laŭdas k admiras publike kontraŭŝtatajn (revoluciajn) agojn, tiu povos esti severe punota.

Do, ni estas certaj, ke la nova leĝo estos preskaŭ pli severa ol la leĝo de la reakciulo O. fon (v.) Bismark. Sed la revolucia movado pro tio ne mortos, male ĝi kreskos. Venos la tago, kiam ni forpelos la ekspluatistojn k iliajn servistojn. *R. Rössler (11 297).*

KINO-ARTO KAJ ARKITEKTURO

Inter la socioj, kiuj provas stariĝi ĉe nia vido, ekzistas la sama rilato. kiu ekzistis dum la Mezepoko inter la arkitekturo k la t. n. kristana socio en Eŭropo, inter la arkitekturo k la t. n. budhisma socio en Kamboĝo, en Javo, en Koreo k en Norda Ĉinio.

La kino estas esprimrimedo esence kolektiva per la multego da individuoj, kies kunlaboradon ĝi bezonas, per la multego da fakoj, kiujn ĝi kreas ĉiutage, per la multego da teknikiloj, kiujn ĝi postulas.

Ĝuste ĝis tiam la arkitekturo estis la sola arto, kiu prezentis ĉiujn tiujn karakterojn; same kiel la profundaj boliĝoj, kiuj movas la sociojn depost la franca revolucio k akiris sian tutan signifon kun la rusa revolucio, estas la solaj, kiuj montras realan analogion kun la spiritaj tajdoj de la Mezepoko.

Oni devas memori, ke la budhismo, ĉe sia origino, ŝajnas esti konsistiganta kontraŭ la povon de la bramanoj movadon el karaktero tiel politika kiel religia, k oni ne forgesu, ke la grandaj katedraloj aperis en la komunumoj, konstruitaj de la profesiaj unuiĝoj k per la revolucio liberigitaj el la feŭda k eklezia jugo.

Inter la kolektiva fenomeno aperinta kun la kino el scienc-estetika fako k la kolektiva fenomeno aperinta kun la sindikatismo k komunismo en la socipolitika fako, ekzistas paralelismo tiel preciza k akordo tiel necesas kiel inter la ekfloriĝo de la granda arkitekturo k la stariĝo de la mezepoka socio.

Se la katolikismo kunhelpis en tiu stariĝo, estas en la sama proporcio kiel la Enciklopedio, la socialistaj sistemoj k la scienco el la lasta jarcento kunhelpis en la orientado de nia epoko kun revolucioj.

Oni sendube kontraŭdiros, menciante la mistikan karakteron de la mezepoka arto. Mi respondos unue, ke civila arkitekturo de la Mezepoko egalvaloras la religian k ke ĝia korporacia fervoro estas intime ligita kun la fervoro de la kristanaj amasoj — rigardu la vendhalojn en Ipr (Ypres, Belgio) aŭ la palacon de la papoj en Avinjon (Avignon, Francio). Poste, ke kiuj kontraŭmetas la kristanan kredon al la revolucia pasio, tiuj vidas ĉi tiun el ekstere, k ke la aspiro al la transmondo ne estas la ekskluziva karakterizaĵo de la mistikuloj: ĉia kolektiva espero estas impeta aspirado al la unuiĝo en Dion.

Elio For (france: Faure).
El "Monde" tradukis Herezulo.

TAGO EL MIA VIVO

La suno brilas varme malsupren. Blua, helblua estas la ĉielo. Dum nokto frostegis. Prujno, kvazaŭ maldika arĝenta kovrilo kuŝas sur la sabla herbejo. Do, nun la sunradioj ne plu estas tiel sendanĝeraj kiel antaŭ kelkaj semajnoj. Ili enakvigas ĉion glaciiĝintan. Ĉie pendas malgrandaj gutoj je la tigoj. En ili rebrilas la suno. Ŝajnas, kvazaŭ brilegantaj diamantoj troviĝas en la arĝenta kovrilo. Ĉio brilas, brilegas, trembrilas pro la sunradiaro.



Grakantaj korvoj flugas malrapide, tre alte je la blua ĉielo. Antaŭ kelkaj semajnoj ili ankoraŭ flugis serĉante preskaŭ sur la tero. Sed nun ĉi tiu nigra korvaro, ĉi tiuj flugilportantaj senditoj de l' vintro disflugas k malaperas en la arbaroj. Anstataŭe la printempo sendas siajn anoncantojn: la unuaj alaŭdoj estas ĉi tie. Ili ankoraŭ ne tenas sin en la aero, malmulte flugetante, sed flugas puŝmaniere k kelk-

malestetika, malhigiena k malekonomia enterigo de homkadavroj. Nunaj tombejoj ĉe grandaj urboj malutile okupas k malhigienigas egajn spacojn.

8. 5. Dekutimiĝi uzi moŝtajn vortojn k esprimojn, kiuj montras prarilatojn de produktistoj en feŭda mezepoka socio *(sinjoro, monsieur, sir, Herr, sudarj, pan, baj, ekscelenco, majesteco, grafo, princo, humila servanto* k. s.).

Niaj senmoŝtaj (ne tro uzendaj) vokvortoj estu *kamrado*[2], *kolego, sociano* aŭ pli simpla k intima *samano* sen seksa distingo. Por atentigi aŭ paroligi nekonatan personon uzi la vorton: *atent'* (angla *allo*, rusa *au, ej*).

9. En loĝejkonstruado

Ni devas celi laŭ jenaj konsideroj k planoj. — Kresko de nunaj interkonkurantaj *oazoj-urboj* jam venas al sia kulmino k devas kune kun malnova sociordo revolucie ŝanĝi pluan direkton de sia disvolviĝo. Diferenco inter terkulturisto k fabriklaboristo malaperas. Terkulturejoj pli k pli similas panfabrikojn kun dungitaj laboristoj. Urbo k vilaĝo tendencas feliĉe kunflui. Loĝejkonstruo devas respondi al kolektivigo k intensigo de produktado k konstruekonomio. Tial domoj ne devas esti malŝpare k senorde dismetataj sur egaj spacoj kiel en nunaj urboj k vilaĝoj. Ĝardenurboj, kiuj sub preteksto de higienigo celas burĝecan individuigon de loĝejoj, el konstruvidpunkto estas pli neekonomiaj ol eĉ nunaj urboj. Ili postulas grandajn spacojn, malutile longigas k kurbigas liniojn de relvojoj, kabloj k diversaj kondukiloj, ili celas nur iom malfortigi malbonojn de nunaj urboj, ne radikale forigi ilin, ili tute ne celas samtipigi produktadon de urbo k vilaĝo. Ili estas kara burĝa utopio neefektivigebla eĉ en Sovetio.

Nuna tekniko jam permesas transiri al sistemeca (laŭ kresko de loĝantaro), regula surloĝigo de tero ne oazmaniere, sed per konstruado de longaj (300 ĝis 400 m) domegoj[1] perpendikule al kelkoblaj rel- k aŭtovojoj, irantaj laŭ meridianoj k paraleloj. La domegoj (1-, 2-, 3-etaĝaj) kun lumaj koridorojstratetoj havos po ĉirkaŭe 100 dece izolitaj loĝejoj kun same metitaj servoj. La domegoj alternos per same konstruitaj fabrikoj laŭ tio, kian fabrikotan krudaĵon prezentos apuda terspaco (minaĵo, ligno, karbo, terkulturejo, mineraloj ktp.). Ĝi estos unustrata urbo, iranta tra kampoj, montoj k arbaroj. Ĉiu domego (dekstre k maldekstre de l' ĉefvojo) senpere apudos prilaborotajn spacojn, naturajn kampojn k arbarojn, ne mizerajn k neekspluateblajn ĝardenetojn de ĝardenurboj. Senĉesan vicon da domoj rompos nur tiaj lokoj, sur kiuj konstrui domojn estos neeble (riveroj, abismoj, rokoj ktp.). Ĉiuj 10 kilometroj da tia urbo-strato povas enteni ĉ. 100 000 loĝantojn. Nur haven-urboj kiel centroj de mar-transporto vole-nevole ankoraŭ longe povas konservi nunan oazkarakteron. — Sen deca aranĝo de loĝmaniero komunismo ne estos ebla.

(Finota.)

[2] Tro longaj plenvokalaj ofte uzataj esper. vortoj (kamarado, proletario, diferenco, konkurenco, mezuri, maldekstra, okulo) evolue mallongiĝas en la formojn: kamrado, proleto, difero, konkuro, meri, lefa, oklo ktp.

[1] Ili povas esti plej diversstilaj responde al konstrumaterialo, klimato, situo ktp.

ABONU AL "LA NOVA EPOKO"!

foje trilas dum tio. Sed tio do ne estas vera alaŭda trilo: sen ĝi printempo en Germanio ne estas pensebla, kiu superfluigas la koron pro la nova vekiĝanta vivo, pro la ĝojego, pro la flutkantado ĉe la superpatrino Naturo.

Ankaŭ la sturnoj estas ĉi tie: Ili ĉijare alflugis iomete malfrue, ĉar la vintro estis tro severa (1928/29). Ĝi certe estus mortpreminta ilin per sia glacia mano, se ili estus venintaj pli frue. Sed nun ili flutas en la plej altaj arbaj pintoj, sen fino, kvazaŭ ili volus rebonigi la malfruan alflugon. Kia mole k dolĉe sonanta printempa muziko!

Malgraŭ ke la printempa suno disfluigis la vintron en milojn da pecaĉoj k kondamnis tiujn malpurajn restaĵojn de iama ĝia rekorda regado en la plej malhelaj anguloj je disfluemo ĝis malapero, ankoraŭ ĝiaj signoj ne tute forestas. La riverojn k lagojn li tenas ankoraŭ forte en siaj rigidigaj manoj. Kelkfoje tondras obtuze la glacio. La sunradioj pikas akre. En la mezo de l' rivero estas jam akvejoj. Subite — — — Kio estas tio? Kvin gigantaj birdoj alflugas per rapidaj flugilbatoj el la sunbrilo. Per impona glitflugo ili pafĵetiĝas en gracia kurblinio en la ŝaŭmantan akvon. Kiaj birdoj estas ili? Kvin cignoj! Ofte ili trempas la noble formitajn kolojn sub la akvon. Kelkfoje dum ama ludo la terure malfermitaj bekoj celas neamatan konkuranton.

Sur la bordo de l' rivero, kie la longaj pinoj etendiĝas trans la sablobaron ĝis la akvo, ankaŭ regas amludo. Fringoj saltetas en la arbetoj k sonigas sian profetaĵon: "Bel-bel'-veter' sur tuta ter' "en la varmetan printempan aeron. Ankaŭ la flav-emberizoj[1] ĉeestas k fajfkantas sian longdaŭran vokon: "zip, zip, zip, zip, zap, zi"; kio memorigas pri malagrablaj varmegaj tagmezoj dum somero. En la arbustaj pintoj de l' pinoj sin ĉasas tri garoloj. Malkviete postflugas unu la alian; ili interbatiĝas ĉirkaŭ la branĉoj k krias plej sennombrajn sonaĉojn.

Sciuro saltas timigite de branĉo al branĉo. En la malproksimo frapas pegoj, laŭte k senĉese. Ĉie inter la bestoj regas vigla vivo. Sed ankoraŭ ne partoprenas la kreskaĵoj je la printempa ĝojo. Ankoraŭ mankas la ĝermantaj verdaĵoj en la naturo. Nu, baldaŭ ili venos k ĝojigos la okulojn k alportos novan esperon, novan energion por la severa vivbatalo, por la plenmalhelpa ekzist-batalo de l' homo.

Hellmut Otto (3349), Spandaŭ, Germ.

---

[1] Speco de paseroj.

K-doj! Zorgu, ke gazetoj enpresantaj viajn tradukojn el "S-ulo", nepre menciu la fonton!

DISKUTEJO

Kiel rilati al militservo?

La du pri tiu temo aperintaj artikoloj (en n-oj 275, 279), konatigis min kun tri K-doj. Kvankam ili havas kontraŭan opinion rilate al militservo mi certe pravas, se mi asertas, ke ili ĉiuj tri estas veraj socialistoj, kiuj aktive kunhelpas plibonigi la mizeran situacion de l' tutmonda proletaro.

Pro kio disiĝas iliaj opinioj? Mi kredas, ke mi eltrovis la kaŭzon. La latvia K-do devas militservi k pro tio proprakorpe sentas la malbonajn influojn k efikojn de tia burĝa parazitaĵo, altrudita al la tutmonda laboristaro. La Stettin-aj K-doj, laŭ siaj eldiroj, ja tute ne devige militservas k pro tio rigardas la aferon aliokule. Spite tio ili pravas, dirante, ke vera socialisto ĉiam devas kontraŭbatali ĉian militservon. La vere rektan metodon altiri indiferentajn K-dojn al klaskonscio, mi mem ankaŭ uzas, se mi havas okazon fari tion. Militservinte en la svisa armeo dum 6 jaroj, mi spertis, ke aktiva militservo estas la plej taŭga kontraŭmilita propagandilo. Kvankam mi ne povis atingi pli altan rangon ol anstataŭanto de l' suboficiro, — mi do ĉiam restis simpla infanteriisto —, baldaŭ mi eksciis, ke nekontraŭdirema soldato havas pli facilan servon ol kontraŭdirulo. Pro tio mi tre bone komprenas la eldirojn de l' latvia K-do, kiu pro sia suboficira rango certe ne estas malpli bona socialisto ol K-do, kiu ne devas militservi.

Por ni socialistoj la militserva afero estas nepre priparolenda. Certe la Stettin-ajn K-dojn oni devas laŭdi, ĉar ili streĉe klopodas klarigi al junuloj la malpravon de l' militservo, sed laŭ mia opinio tia agadmaniero ne estas sufiĉe efika por malhelpi k estonte eĉ tute forigi tiun servon. La klasbatala laboristaro pli fervore dediĉu sian tutan atenton al la lernejeduka afero. Oni devas forigi do el la eduka fako ĉiujn instruistojn, kiuj estas oficiroj en iu ajn armeo (eĉ savarme-oficiroj). Dum la porlernejaj balotoj, oni proponu nur instruistojn devenantajn el la simpla proletaro k zorgu pri lia elektiĝo. La lernejo fortagrade estas plantejo de l' ŝovinismo. Ankaŭ en la gepatra hejmo, la infanoj prefere legu kontraŭmilitajn legaĵojn k ne aventurajn, militadorantajn broŝurojn aŭ alian filiteraturon, kiu ofte pli kapablas influi la infanan cerbon ol la gepatroj mem. Dum vojaĝo aŭ promenado oni klarigu al la malgranduloj la domaĝojn de l' milito k la de ĝi kaŭzitan tutmondan mizeron. Ĉiu eduku siajn infanojn laŭpove, por ke iliaj karakteroj alkutimiĝu je milita abomeno. Kiu ne kapablas fari tion, demandu spertan K-don, k, se necese, petu helpon de li.

Tiel agante ni certe pli rapide atingos nian celon forigi ĉian militon, ol per polemikoj, interdisputante, ĉu pravas nemilitservanto, simpla soldato aŭ eĉ suboficiro. Al la infaneduka afero la tutmonda proletaro dediĉu sian atenton!

Sennaciulo en *Papiermühle*, Svisio (14 103).

Ĉasado kaj buĉado

Per tiuj kelkaj vortoj mi ne deziras rehonorigi la ĉasadon, sed montri, ke ĝi estas *malpli* kruela ol la buĉado, k ke tiuj, kiuj kompatis la ĉasbestojn, devas pli kompati la nesovaĝajn bestojn.

Efektive, dum ĉasado oni persekutas bestojn, kiuj faris (aŭ ne faris) grandan domaĝon al la rikoltoj, k kiuj forkuras antaŭ la homo. Ŝajnas, ke oni defendas propraĵon. Male, por vendi viandon, kiun la viandisto dispecigas per manoj makulitaj je sango, oni buĉas bestojn, kiuj ne nur estas nesovaĝaj, sed kiuj estis utilaj dum sia vivo, kiuj donis al la homo laboron, lakton, lanon, ovojn. Eĉ oni vidas ofte ŝafidojn sekvantaj sian posedanton kiel hundo, aŭ kokinon, kuniklon manĝantaj el la mano de infanoj. Por rekompenci ilin pro tiuj utilo k afablo, oni ilin buĉas! La ĉasisto ne havas saman kruelon.

Due, kiam oni pafas leporon aŭ perdrikon, tre ofte ĝi falas, mortinta, k se ĝi ne mortis tuj, oni sufokas aŭ mortfrapas ĝin k ĝi ne suferas longe. (Tio ne estas ĉiam kompato eble, sed nur okazas tial, ke oni ne sangigu la ĉasaĵon.) Kaj kiel agas buĉisto? Por buĉi porkon, ŝafidon, kapridon, eĉ bovidon, li pendigas ĝin per la piedoj k tranĉas al ĝi la gorĝon. Neniu diros, ke tiuj bestoj ne havas dolorojn ĝis sia fina morto. Ĉiu povas nun konkludi.

Sed ve!... Malgraŭ tiaj argumentoj ... mi manĝas viandon!!

179.

PRI MORALO

Dzerĵinski pri promesoj

En 1918, la bolŝevikoj sieĝis en Krimeo iun taĉmenton de Vrangel. Sen vivrimedoj, sen municio la blankuloj ne povis longe rezisti. Ili tamen ne cedis. Estro de la ruĝarmeo sendis komisiiton, kiu promesis, ke ili savos sian vivon per kapitulaco. Fideme la sieĝatoj konsentis, sed malgraŭ la promeso farita ili estas mortpafataj.

Eksciinte tion, Dzerĵinski, la tiama estro de la "Ĉeka", tre koleris; li sendis taĉmenton el Ĉekanoj kun la nepra ordono puni la promesrompintojn per mortpafo.

La tiom timata bolŝevikestro estis honesta homo, kiu obeis moralajn principojn ...

Esperanto-Servo

N-o 26 — 4-a jaro Gvidanto k kompilanto: O. BÄSSLER, Ebermayer-Str. 8, I, Leipzig C 1 (Germ.) 27. Marto 1930

EL URUGVAJO

El viand-fabrikoj en Montevideo

174 (Esp.-Servo.) En la fabriko Artigas (angla entrepreno) laboras 3000 gelaboristoj, inter kiuj estas 1000 enmigrintoj. El la 3000 gelaboristoj estas 1050 laboristinoj k 50 infanoj. En la glaciiga ĉambro, en kiu la restado eĉ por viroj estas sufiĉe malfacila, laboras nur 4 viroj k la aliaj estas laboristinoj. Dum la lastaj monatoj malsaniĝis 48 gelaboristoj, el kiuj 18 laboris en la glaciiga ĉambro. En la fabriko Svift (ankaŭ angla entrepreno) laboras 5000 gelaboristoj; el ili 2000 estas enmigrintoj — litovoj, jugoslavoj, poloj, bulgaroj, rusoj, rumanoj k hungaroj — kiuj preskaŭ senescepte ne scipovas hispanan lingvon. En la fabriko Svift la minimuma salajro po tago estas: por laboristoj 1,76 peso, por laboristinoj 0,80 peso. La laboro komenciĝas matene je 6-a horo; certa labortempo ne estas fiksita. En la fabriko Artigas la laboristoj ricevas po tago 1,60 peson, la plej malalta salajro estas 0,30 peso. En ambaŭ fabrikoj organizigo de la laboristoj estas tute malebla, ĉar la diverslingvanoj malamas unu la alian. En lasta semajno de februaro la sindikato de viandlaboristoj proponis strikon, kiu estis akceptita de la amaso. Sed lunde, kiam la striko devis komenciĝi, teroro de policistoj k kontraŭpropagando flanke de anarkistoj malebligis ĝin. La kontraŭpropagando estis facila precipe inter la enmigrintoj, ĉar ili timis forpelon el la fabriko k eĉ ne volis aŭskulti la propagandistojn. La simpatio por striko estis granda, sed la timigitaj laboristoj rompis ĝin jam dekomence. La kapitalistoj, konante la specialan situacion de la gelaboristoj — malatentante ĉiun leĝon k eĉ helpate de la lokaj regantoj — treege ekspluatas la amason. Komence de la striko policistoj arestis 50 Gekamaradojn. *13 827, Montevideo.*

Piedpilka stadiono konstruata

175 (Esp.-Servo.) En Montevideo oni nun konstruas novan piedpilkstadionon, kiu devas esti preta ĝis monato aŭgusto, kiam oni okazigos mondkonkurson piedpilkan. Je la konstruado laboras ĉ. 300 laboristoj. Tie ĉi estas videbla la moderna sklaveco. Oni ĝissange ekspluatas la laboristojn. La laboristoj devas labori 10—12 horojn po tago. Estas multaj laboristoj, kiuj komencas labori matene je 6-a horo k finas vespere je 20-a horo. Dum akcidento neniu interesiĝas pri la malsanuloj. Okazis, ke defalinta tero kovris tri laboristojn; kiam finfine oni estis malkovrintaj ilin, la laborgvidanto simple sendis ilin hejmen. La amaso laboras superante unu la alian, timante forpelon. La kapitalistoj, sciante la malfacilan situacion de la amaso, senkompate daŭrigas la ekspluatadon. *13 827, Montevideo.*

Kamparanoj venas en urbon

176 (Esp.-Servo.) En departemento *Soriano* multaj kamparanaj familioj forlasis sian bieneton k venis Montevideon. La vivo por la kamparanoj estas tre mizera, ĉar pro manko de fervojoj oni ne povas vendi sian rikoltitan grenon. Posedantoj de bienetoj, kiuj situas malproksime de vilaĝo, eĉ panon k ĉiutagajn bezonaĵojn treege malfacile povas akiri. La ŝtato ne interesiĝas pri ili. La terkulturistoj, venintaj la urbon, nur daŭrigas sian mizeran vivadon, ĉar ankaŭ en la urbo la situacio por ili estas malbona. *13 827, Montevideo.*

Senlaboruloj en Latin-Ameriko

177 (Esp.-Servo.) En Meksikio estas pli ol 700 000 senlaboruloj, en Kubo 300 000, en Kolumbio 150 000, en Gvatemalo 60 000, en Kostariko pli ol 40 000. Pri Honduraso, Panamo, Argentino, Urugvajo, Ekuadoro, Peruo. Ĉilio, Bolivio k Paragvajo ankoraŭ mankas statistikoj; sed ankaŭ en tiuj landoj la senlaboreco estas grandega. La 20-an de marto estos grandaj manifestacioj de senlaboruloj en tuta Latin-Ameriko; ĝis tiam la sindikatoj prezentos pli kompletan statistikon pri senlaboruloj. *13 827, Montevideo.*

EL GERMANIO

Scenoj el "libera" respubliko

178 (Esp.-Servo.) 1. Estas la 6-a de marto 1930. Ĉie ajn kolektiĝas amasoj da homoj, por manifestacii kontraŭ malsato, *por laboro k pano*. Cent- k pliope ili provas, spite malpermeso, marŝi en la internon de la urbo Chemnitz. De ĉiuj flankoj almarŝas la rotoj da senlaboruloj. — 2. Subite oni aŭdas la incitantan signalon de policaj aŭtomobiloj. Ĉe strat-kruciĝo ili ekhaltas, k la policanoj, svingante la gumbastonojn, senkompate batas sur la homojn, neelektante inter viroj k inoj, grizharuloj k infanoj. La strato malpleniĝas, k kontente la policanoj forveturas, por "labori" je alia loko. — 3. La disbatitaj amasoj denove kolektiĝas, k kantante revoluciajn kantojn ili ree marŝas tra la stratoj ... Ankoraŭfoje ili estas disbatataj. Nun ili provas unuope atingi la internon de la urbo. La trotuaroj estas plenplenaj da homoj, oni preskaŭ ne povas iri. Subite aŭdiĝas galopado de ĉevaloj k jam alvenas rajdanta polico. Svingante siajn sabrojn, ili rajdas sur la trotuaron. Kiu ne povas ĝustatempe rifuĝi, estas batata aŭ terenpuŝata. Post tiu atako la policanoj forgalopas, kriegante kvazaŭ sovaĝa bovaro. — 4. La plimulto de la senlaborularo atingis la internon de la urbo. Laboristoj, venantaj el fabrikoj, aliĝas. La amasoj kreskegas. La trafiko preskaŭ ne estas ebla. La atakoj flanke de la polico ne ĉesas. Sed spite tio la senlaborularo aranĝas manifestaciojn, jen tie, jen tie ĉi! — Tiel finiĝis la tutmonda senlaborula tago en Chemnitz. En kelkaj aliaj urboj eĉ fluis sango! Spite ĉio — ni ne estas malpermeseblaj! *R. Rössler (Einsiedel).*

EL ANGLIO

Internacia senlaborula tago en Anglio

179 (Esp.-Servo.) En Anglio sub aŭspicioj de la komunista partio okazis dum la "ruĝa ĵaŭdo" (6-an de marto) grandaj kunvenoj. Sed pro interveno de polico ili malsukcesis k nur malpli gravaj manifestacioj okazis en kelkaj el la ĉefurboj. En Tower Hill (Turo Monteto) okazis interbatiĝo inter policanoj k manifestantoj. Ĉi lastaj estis senlaboruloj, kiuj triope en daŭro de kvar horoj penis marŝi kun standardoj al la domo de la ĉef-urbestro. Multaj estis vunditaj, dum ili provis rompi la polican barikadon. Kelkaj komunistaj gvidantoj parolis antaŭ la kunvenintaro. Oni arestis kvar manifestantojn en Glasgow, kvin en Manĥester k kvar en Dublino. Ankaŭ en Burnley estis disbatitaj de policanoj grandaj popolamasoj. *2800, Londono.*

EL POLIO

Kiom da komunistoj estas en Polio?

180 (Esp.-Servo.) Laŭ neoficialaj informoj la nombro de komunistoj en Polio prezentiĝas jene: kompartio 7000 membroj; junkomunistaro 10 000 membroj; ruĝpioniroj 2500 membroj; Internacio de ruĝaj profunuiĝoj 100 000 membroj; IRH (Internacia Ruĝa Helpo) 110 000 membroj. Kaj simpatiuloj, malaktivuloj? Kom-ĵurnalaro (kompreneble mallegala) konsistas el jenaj presorganoj: "Czerwony Sztandar" (Ruĝa Standardo), "Spartak" (Spartako), "Mlody Komunista" (Juna Komunisto) k "Pioner" (Pioniro). *C. G.*

RESPONDA PARTO

Certe ne ĉiuj raportoj plaĉas k konvenas al vi; tamen ĝis nun ne venis eĉ unu kritiko. Ĉiu helpu, sendante al ni taŭgajn raportojn, por pleje utiligi la lokon de ĉi paĝo laŭ celo difinita al ĝi: Esperanto-Servo por tutmonda ĝenerala laborist-movado.

NI ATENDAS RAPORTOJN EL ĈIUJ REGIONOJ ...!

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 14 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 14

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.

PRI ATEISTA LITERATURO EN ESPERANTO

Lastan jaron en nia esperantist-liberpensula kampo ni povas karakterizi kiel jaron de granda vigliĝo, precipe en eldonagado.

Ni konstatas regulan aperon de "Liberpensula Paĝo", kvankam ne regulan, tamen aperadon de "Liberpensula Servo". Krom tio "Esperanto-Servo" k "S-ulo" ĉiam havis apartajn artikoletojn priliberpensajn. Ni konkludas, ke por tiuj kontraŭreligiaj problemoj ekzistas plifortiĝanta intereso.

Estas kompreneble, ke en tiaj cirkonstancoj estas tre bezonataj pli seriozaj iloj por kontraŭbatali religion, kiu nun tutforte apogas sin sur kapitalista mondo, kiu nun estas plej fidinda servanto al la kapitalo. Ankaŭ estas kompreneble, ke niaj liberpensuloj prizorgas eldonon de speciala liberpensula literaturo en esperanto.

Kiel unuan printempan birdon ni povis noti tiurilate specialan kontraŭpaskan ateistan numeron de "La Nova Epoko", kiu precipe enhavis kontraŭreligiajn originalaĵojn. Ĝi estis senduba sukceso, sukceso eĉ en tiu rilato, ke la numero estis kunmetita de K-doj el diversaj landoj kaj ĝi havis sciencan seriozan propagandartikolon (ankaŭ originalan) de famekonata en Sovetio kontraŭreligiulo K-do Rumjancev. La artikolo temis pri deveno k miteco de l' paska legendo, senmaskigis ekspluatistan karakteron de l' festo. Ĉi tiu numero de "La Nova Epoko" sendube plenumis sian rolon de liberigilo proletara.

Sed precipe grava momento estis, kiam nia esperantista liberpensularo ekposedis la unuan kontraŭreligian libron en esperanto. Ĝi estis traduko de Lenin-artikoloj pri religio (Lenin "Pri religio", eld. de CK SEU kaj Tutsovetia Ateista Unio). En tiu libreto nia tutmonda liberpensularo esperantista ekposedis tre seriozan, vere marksisman analizon k koncepton pri la religio, ankaŭ traktadon de la problemo pri rilatoj al religio flanke de laborista partio, problemo, kiu multe estas diskutata en la mondo k interesas ankaŭ la esperantistojn. La libro, kiu estas vigle aĉetata de K-doj el diversaj landoj, okulvideble, ĝuste kontentigis nian esperantistan liberpensularon. Dank' al tio ni povas konstati, ke la libro ĝuste trafis sian celon kiel kontraŭreligia batalilo.

Poste ni ekhavis alian libron, tradukitan el la rusa lingvo: "M. Ŝejnman. Milito kaj religio". La temo tuŝas plej aktualan problemon. La mondo estas skuata de militdanĝero, proletoj el ĉiuj landoj tion bone spertas, sed ne ĉiuj komprenas, kiun rolon en tiu kapitalista preparado por milito plenumas eklezioj k religio entute. La libreto estas saturita per plej aktualaj faktoj el tutmondo, kiuj klare montras, kiel aktive la religio partoprenas tiun militpreparon, ankaŭ kontraŭ Sovetio. Per ĉi tiuj multaj faktoj la broŝuro bone edukas en proletoj batalemon kontraŭ kapitalista mondo k ties servantoj, inter kiuj la religio nun ĉefas. La libro serioze k diversflanke pritraktas tiun aktualan problemon. La ĉefa intereso je la libro estas, ke ĝi analizas problemon per nuntempaj faktoj, ne antikvaj k historiaj, pro kio ĝi estas plej komprenebla al ĉiu proleto, ne sperta en historiaĵoj, tamen informita pri lastaj faktoj de monda politiko. Ni devas taksi tiun liborn kiel komencon de aktualiĝo de nia literaturo, en tio konsistas ĝia precipa valoro.

Estas rimarkinde, ke tiun elpaŝon en liberpensula literatura kampo faris sovetiaj ateistoj-esperantistoj. Ni devas konstati, ke alilandaj K-doj ĝis nun neniom preskaŭ prizorgas por konatigi en esperanto plej valorajn liberpensaĵojn diversnaciajn.

Finante ni povas informi la legantaron, ke ankaŭ sovetiaj K-doj jam liveris al SAT-kooperativo du novajn manuskriptojn ateismajn: E. Jaroslavski, "Pensoj de Lenin pri religio" k malgranda broŝureto pri deveno de religio. Ankaŭ jam estas tradukita k eldonota la libro de M. Ŝejnman "Moralo proleta k moralo religia". Estas nun tradukataj k enplanigitaj por eldono de CK SEU kaj Tutsovetia Ateista Unio kelkaj aliaj broŝuroj. K-do Rumjancev nun originale verkas en esperanto libreton "Ĉu ekzistis Kristo?" k K-do N. Incertov ankaŭ originalan broŝuron "Al kiu servas baptistoj"?

Ni devas saluti niajn esperantistojnliberpensulojn, kiuj ekzemplon donas kreante fakan literaturon en esperanto. Ni devas deziri, ke liberpensuloj de diversaj landoj sekvu la vojon de sovetiaj ateistoj-esperantistoj k pliriĉigu esperantan literaturon per modelaj verkoj liberpensaj de diversaj landoj. *259.*

BIBLIOTEKO DE SENNACIULO

N-o 7

La Vojo al Scienco de Estonto

de Akademiano *Fersman*

Tradukis *S. Rublov*

Kun speciala antaŭparolo de l' aŭtoro por la esperanta eldono. — Tre interesa popularscienca verketo, tute aktuala, montranta larĝajn perspektivojn en la estonton. — Ĉin ĉiu K-do legos kun granda ĝojo.

Prezo: 0,60 mk. g.

Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27

Batalorganizo de l' Belgia Eklezio Katolika

La katolika eklezio en Belgio enpenetras ĉiujn kampojn de l' publika vivo. Apud ĉiu fako ĝi kreas la "katolikan"; eĉ la morala sinteno de ĉiu belga civitano estas ŝirmata kontraŭ la malvirtoj de nia socio. Spirite tiu pastra ĉestaranto apud ĉia manifestacio de l' amaso estas ja danĝero por la senantaŭjuĝuloj, sed sufiĉus por ĉi tiuj unuiĝi k forte lukti sur la spirita batalkampo por venki la malkleron.

Sed mono estas nervo de l' milito. La klerikaluloj jam delonge komprenis ĉi tiun proverbon k aplikis ĝin. En Belgio ĉe bankoj k sur ekonomia kampo ĝi estas observata.

Belgio konsistas el 2 landoj malsimilaj unu je la alia, *Valonio* (franca) k Flandrio (ĝermana), kiu grandparte estas agrara (kontraŭe je Valonio, kiu estas ĉefe industria), sekve religiema. La buĉado de 1914—18 pliriĉigis la flandran kamparanaron k samtempe pligravigis la potencon de ĝiaj profunuiĝoj.

Fondita en 1890, la kamparana "sindikato" (*Boerenbond*, elp. Bur'nbond) celas helpi konsili siajn anojn pri ĉia ajn agrara temo. Sed tio ne nur estas ĝia rolo. La pastraro, kiuj estas ĝiaj gvidantoj (la nuna ĝenerala sekretario estas abato) devigas ĉiun praktiki la katolikan religion. Kredu aŭ malsatu! Sekve la Kamparana Ligo estas grava pezo en la politika pesilo.

Kia estas ĝia potenco?

Je la fino de 1928 ĝi grupigis 121 455 familiojn disdividitajn en 1 203 gildojn (t. e. komunumaj sekcioj); kvankam bazata sur loka organizsistemo, la K. L. estas forte centrigita. La "stabo" troviĝas en la urbo *Loveno* (nederland-lingve: Leuven), el kie disiras ĉiuj ordonoj.

La monaj negocoj estas koncentritaj en la *"Centra Kredit-Kaso"*, kiun aliĝas 980 ŝparkasoj.

Depost la milito la K. L. pli k pli okupiĝas pri financa politiko, kiu adaptiĝas je ĝia agrara aktiveco. Dum la printempo 1928 ĝi partoprenis la Frankfurtan foiron k aliajn aranĝojn.

Ĝia *"Centra Aĉet- k Vend-Oficejo"* en 1927 aĉetis por 376 milionoj da fr.

TRA ESPERANTIO

NE KONTRAŬ, SED JAM POR ESPERANTO!

En "S-ulo" n-o 282 K-do 12 408 citas fragmenton el la lasta artikolo de K-dino Krupskaja k titolas sian komunikon per "Nova elpaŝo kontraŭ esp-o". Kaj mi, kvankam malproksima de malgraŭ-ĉia optimismo, kontraŭe nomas la lastan elpaŝon de K-dino Krupskaja nova konfeso *por* esp-o. Ĉu mi pravas? Juĝu la legantaro mem, sed jen la konsideroj k faktoj.

K-dino Krupskaja jam kelkfoje parolis kontraŭ esp-o. Ankoraŭ en la jaro 1923 ŝi asertis, ke "estas sensenca elspezi tempon por enlerneja esp. studado de infanoj", en la j. 1927 ŝi estis pruvanta, ke "la provoj krei artefaritan lingvon, similan al esp-o, estas ekstreme naivaj k evidentigas la supraĵan koncepton pri tio, kio estas kulturo."

La nova elpaŝo de K-dino Krupskaja tial tute ne estas neatendita por ni. Kaj tamen en ŝia elpaŝo estas io nova — la parta retiriĝo de antaŭa ŝia pozicio pri la plena malagnosko de esp-o, eble nevola, devigita, sed tamen la parta *konfeso por esp-o*.

Ni vidu, kion skribis K-dino K. en la jaro 1923:

"Ĉiuj afer-interrilatoj, ĉiuj naturaj interrilatoj inter homoj diversnaciaj estos *ĉiam* farataj en iu el la vivaj (t. e. naciaj G. D.) lingvoj, k la artefarita lingvo restos posedaĵo nur de malgranda homgrupo."

Sekve, la lingvo artefarita ne taŭgas eĉ por la simplaj interrilatoj interhomaj. Ni citu pluajn liniojn:

"Se oni eĉ enkondukus esp-on en lernejoj, tio havus malgrandan signifon, ĉar, pro foresto de praktiko, la akirita en lernejo scio de esp-o estus rapide forgesata, k ĉe la renkontiĝo kun la efektivo ĉiufoje estus evidentiĝanta la neceso scii la vivan lingvon."

De tiam pasis pli ol ses jaroj k intertempe esp-o pruvis sian praktikan aplikeblon. En dekoj da sovet-lernejoj infanoj-esp-istoj plej vigle interligas sin per esp-o kun alilandaj laboristinfanoj. Forirante el la lernejoj k fariĝante junul-komunistoj, ili daŭrigas utiligi esp-on por internacieca laboro en KJA (komunista junul-asocio); pri la sukcesoj de tiu laboro komencis paroli ne nur esp-istoj: kelkaj distriktaj organizoj de KJA eldonis eĉ specialajn broŝurojn, en kiuj ili kun sufiĉaj detaloj rakontas ne nur pri la eblo de abunda esp. praktikado ĉe junul-komunistoj, sed ankaŭ pri tio, ke esp-o preskaŭ estas la sola lingvo de la viveca internacia kunligo k de junul-komunista internacia laboro. Ni citu nur la broŝurojn de F. Kinĵalov "La sperto de konkreta gvidado", de Gluŝĉenko "Ni, KJI-anoj", de Luganska distrikta komitato de LKSMU "Ĉu, K-do, ci estas KJI-ano?", de Kieva region-k-to de LKSMU "Ruĝ-Front" — ĉiuj ĉi broŝuroj detale rakontas, kiel ĉe la renkontiĝo kun la hodiaŭa efektivo niaj junulkomunistoj uzas ne la nacilingvojn, sed artefaritan esp-on.

Ĉion ĉi ne povis ne rimarki K-dino Krupskaja, k en sia lasta artikolo, presita en junul-komunista ĵurnalo k citita de K-do 12 408 en "S-ulo", ŝi estas devigita retiriĝi de sia antaŭa pozicio, forlasi sian antaŭan aserton pri la neeblo de afer-interrilatoj en esp-o, ŝi estas devigita fari la konfeson rekte kontraŭan, kiun ŝi faras en la formo timema, ekstreme singarda.

"En plej bona okazo ĝi (t. e. artefarita lingvo simila al esp-o. G. D.) *taŭgos por interrilatoj.*"

Pri kio atestas tiu ĉi timema k singarda konfeso? Ĝi atestas pri tio, ke esp-o venkas K-dinon K., ke ĝi, senĉese firmiĝante k eniĝante la vivon, renversas la teoriajn argumentojn de K-dino K. pri la neeblo k senviveco de artefarita lingvo.

La konfeso timema atestas ankoraŭ pri io alia: K-dino K. ankoraŭ ne trovis la eblon konatiĝi kun la interna vivo de esp-o; ŝi ankoraŭ konsideras ĝin "kreita kabinetmaniere, sed ne elkreskinta en la vivo". En la okuloj de esp-istoj, kiuj bone scias, ke kabinetmaniere estis kreita nur la fundamento de esp-o en la formo de 16 gramatikaj reguloj k 800 radikoj k ke fakte esp-o estas kreata de miloj k centmiloj da praktikantoj, kreata en la aplikado k praktikado ĉiutaga, — en niaj okuloj K-dino K. ankoraŭfoje senarmigis sin k montris, ke oni povas nuntempe paroli kontraŭ esp-o nur tiomgrade, kiomgrade oni ne deziras aŭ ne havas eblon ekscii, kio do estas esp-o.

Ĉu ni protestu kontraŭ la lasta elpaŝo de K-dino K., kiel tion proponas K-do 12 408?

Ne! Ja K-dino K. ne kredas nur tion, ke "junulo dirus siajn unuajn vortojn de l' amo al sia amatino per esp-o, ke patrino kantus al sia ido lul-

ĈU CI, KIES ABONO FINIĜIS

kun tiu ĉi numero, repagos tuj cian abonmonon, por certigi al "S-ulo" en la venontaj semajnoj staton de

4000 ABONANTOJ?

K-doj, ne interrompu vian abonon! Ni kalkulas je via akurato!

k vendis por 99 milionoj da fr. 24 miliardoj estis pagitaj al ĝia asekursocieto; 137 500 polisoj kun 5 miliardoj da frankoj asekuritaj. La K. L. gvidas 7 bankojn, kiuj siaflanke indikas 950 milionojn da fr. da deponaĵo, kies ĉefsumo translokiĝas al la C. K. K.

Laŭ statistiko de 1926, tiu ligo estas la trie granda financa institucio de Belgio.

	Mondeponaĵoj	*Akcideponaĵoj*
Société Générale (en 1926)	2 060 000 000 da fr.	496 430 000 da fr.
Banko de Bruselo (1926)	1 029 000 000 da fr.	412 840 000 da fr.
Ŝparkaso (1926)	2 085 000 000 da fr.	
Poŝtĉekkonto (1926)	1 230 000 000 da fr.	
Centra Kredit-Kaso (en 1920)	228 810 000 da fr.	
Centra Kredit-Kaso (en 1926)	752 830 000 da fr.	342 120 000 da fr.
Centra Kredit-Kaso (en 1928)	1 098 315 000 da fr.	

Lastjare la 2 ĉefaj bankoj inter la 7 filioj kunfandiĝis por starigi gravan bankon kun kapitalo de 200 milionoj (k sub la kontrolo de la K. L.). La nova entrepreno ĵus aĉetis por la sumo de 12 600 000 da fr. la konfiskitan konstruon de la „Deutsche Bank" (Germana Banko).

Industrie la Kamparana Ligo partoprenas en la sekvantaj industrioj: flandra teksaĵa, kotonteksaĵa, silka, meblara, nutra, sukera, farunaĵa, konservaĵa. Ĝi havas interesojn en la karbejoj de Kempenio k de nelonge en la metalindustrio. La Belga Kongo ankaŭ interesas la gvidantojn, k eĉ ili prikonsideras la elmigradon de flandraj katolikaj familioj al Kivu-regiono.

La influa aŭtoritato de l' flandraj pastroj ne nur etendiĝas sur ĉi tiun landeton, sed depost la milito ĝi direktiĝas al la germanaj kantonoj de Ojpen (*Eupen*) k Sankta Vit (*ST. Vith*); en la ĵus pasintaj jaroj ĝi iom post iom penetris Valonion, spite la kolero de l' Valonaj regionistoj k de niaj neŭtralaj liberpensuloj, kiuj en la K. L. vidas antaŭ ĉio la gentan malamikon. Malgraŭ ke ĝi estas flandra organizo, ĝi ne fortege atakas Belgion, kiam temas pri la flandra problemo (kvankam francemaj liberpensuloj opinias tion). Dum la monstabiligo tiu ligo helpis la registaron resanigi la nacian monon.

Kun tiaj rimedoj k organizoj la nigra reakcio povas ja ankoraŭ konservi sian influon sur la amaso.

A. V. G. (je la nomo de la "Materialista Ligo de Belgio").

kanton per esp-o." Nu, ni bone scias, ke ankaŭ tio jam okazas nun. Sed hodiaŭ por ni pli gravas utiligi tutan nian tempon k ĉiujn niajn fortojn por ankaŭ estonte utiligi nian esp. scion serve al la proletaro k ĝia batalo por sia estonto, serve al la konstruado de socialismo k defendado de la laborista potenco jam akirita en sesono de la terglobo.

Sur tiu ĉi vojo ni estas kune kun K-dino K., sur ĝi kune kun ŝi ni batalas por la afero de Lenin.

Kaj ĉiu, eĉ la plej eta, sukceso sur tiu ĉi vojo por ni estas pli grava hodiaŭ, ol ajna aŭtoritata konfeso por esp-o, ĉar la konfeso fariĝas senevita inter hodiaŭ k morgaŭ.

G. Demidjuk (1516).

OPINIOJ PRI NIA GAZETO

Pri la plendo de K. K. (11 321) el Latvio mi esprimu mian opinion.

Mi legas ĉion presitan en "S-ulo", sed kompreneble interesas min ne ĉiuj partoj. Mi ŝatus, ke la gazeto estu kiel eble plej dika, sed kompreneble ne plialtiĝon de la abonkosto. Mi opinias, ke multe el la spaco formalŝpariĝas per bagatelaĵoj k senvaloraj diskutoj, ekz. la antaŭjara nudkulturo-disputo, kiu daŭris dum multaj semajnoj. Nia "S-ulo" ne estu uzata kiel propagandilo por la diversaj flank-aferoj, kiuj interesas nur malgrandan malmulton el la legantoj.

Interesas min artikoloj, kiuj priskribas la ĉiutagan vivon de la ordinara laboristo. Kiel li laboras, pasigas la liberajn horojn; lia sporto, lialandaj festotagoj k la kialoj por ili, la loĝmaniero (tri germanoj tranoktantaj en mia hejmo multe miris vidante la anglan "malferman" fornon k ĉiaman varman akvon, k opiniis hejme faritan fruktaĵon ĉielaĵo) ktp. "Tago el mia vivo" estis komence ideala, sed poste la "Tagoj" ĉiuj samiĝis, k oni tediĝis legante ilin.

Mi opinias, ke multaj el la artikoloj pri strikoj k mizeraj kondiĉoj taŭgas por propaganda gazeto, sed ne por nia eduka gazeto. Sed kompreneble estas esceptoj. Kiel ekzemplon, mi opinias la n-on 282 esti bona n-o.

L. B. (8048), Leeds.

* * *

Rilate al la kritikoj de K-do 11 321 k. a. en n-o 282 mi kontraŭdiras. Mi tre *ŝatas la 12-paĝan "S-ulon"*, mi *ŝatus eĉ pli ampleksan gazeton*. Kial? Mi estas en organizo SAT, kiu disvastiĝu en tuta mondo. Mi ne povas persone koni ĉiujn membrojn, kunulojn. Sed per riĉenhava gazeto mi ekscias, kiel miaj kunfrontanoj pensas, ne nur pri lingvo k klasbatalo, ankaŭ pri ĉiutaga vivo, "personaj" aferoj. Krom raportilo k edukilo nia gazeto estu ligilo, granda letero, de Gek-daro al Gek-daro. Mi nun ne nur volas varbi por la gazeto, ankaŭ kunlaborado estas devo. La celo: SAT-anaro estu unu familio k "S-ulo" krom scienca organo korespondgazeto simila al cirkul-letero de anoj al anoj. Tial: Vivu la 12-paĝa "S-ulo"!

14 624 (Magdeburg).

NE SENDU TRO LONGAJN ARTIKOLOJN! VERKU KONCIZE!

MALGRANDAJ NOTOJ

Grava atentigo!

La informoj pri la Gastdomo k Lab. Esp. Lernejo apud Halifaks (Britio), kiuj estas presitaj en n-oj 280 k 281, koncernas aferon *proponitan*, sed *ne ankoraŭ funkciantan*. Novaj informoj estos publikigataj ĉe la ekfunkciigo, kiu okazos ne antaŭ somero 1931. —

Red. Noto. Kun bedaŭro ni devas konstati, ke oni al ni sendis pri tiu afero por publikigo en "S-ulo" tute fantaziajn informojn. Tio estas kompreneble malbona servo farata al nia movado. La funkciado de tuta nia aparato dependas ja de la fidindo de niaj laborantoj. Ni avertas insiste ĉiujn Gek-dojn sendi por la gazeto nepre nur fidindajn informojn.

Menciu nepre esperanton ĉe represigo de artikoloj esp.-devenaj!

Lastatempe aperis en Britio nova gazeto "Daily Worker" (Ĉiutaga Laboristo). Ĝi enhavas ankaŭ liston de mondonacantoj, en kiu oni ofte renkontas donacojn de "SAT-ano xxx". Kompreneble tio ne estas propagando por nia afero, ĉar neesp-istoj ne scias, ke la vorto SAT-ano rilatas al esp movado. Oni subskribu almenaŭ per "Esperanto-SAT-ano". Ofte vidante tiun vorton, la redaktoro de tia gazeto pli emos doni spacon por nia afero ol ĝis nun.

Same ĉe mencio de la deveno de artikoloj (el "S-ulo" ktp.), devas nepre esti menciata la vorto *esperanto:* tro ofte niaj K-doj malatentas tion, k nia movado neniel profitas el la servo.

L. B., Leeds.

Aperis ĉe SAT-KOOPERATIVO
la belega fantazia romano
de A. Bogdanov

RUĜA STELO

kolektive el rusa lingvo tradukita sub redakto de N. Nekrasov k S. Rublov.

La antaŭenema, multflanke klerigita spirito de l' aŭtoro prezentas al ni ĝuigan legaĵon en romana formo agrable legeblan. Ni vojaĝas al Marso k lernas rigardi kun Marsan-okuloj la terajn okazojn. Multo pensigas nin en tiu libro.

Formato 12×18 cm. 168 paĝoj.
Prezo: **1.60 mk. g** — **Tre leginda libro.**
Mendu tuj ĉe Administracio de SAT Colmstr. 1, Leipzig O 27, Germanio
Sovetianoj mendu rekte ĉe CK SEU, Poŝtkesto 630, Moskvo.

Suplemento al la adresaro en Jarlibro

(Tiu ĉi nomaro ne estas por korespondemuloj)

(2-a daŭrigo. Vidu n-on 284/85)

Kaiserslautern (Germanio)
15750 *Böckel L.*, Sedan-Platz 2.
15749 *Fischer D.*, Pirmasenser Str. 94, tornisto.
15751 *Kettenbaum F.*, Baumschulstr. 4.
15748 *Mannweiler O.*, Kleestr. 25-a, metallaboristo.
15746 *Riedelbrand J.*, Reichswaldstr. 75, fervojinspekt.
15747 *Zirkel L.*, Haagstr. 44, laboristo.
Kamenskoje (Sovetio)
12093 **Joffe H.*, Poĉtovaja 5.
15859 *Levĉenko P.*, studanto.
15468 *Martinov G.*, Verĥnjaja Kolonja 10, kv. 18, konstrudesegnisto.
8572 **Olejseviĉ P.*, Arseniceva, apotekistino.
11499 **Poruĉka A.*, Verĥ.-Kolonia 1, kv. 13,
15578 *Radĉiu D.*, Korolenkovskaja 6, kv. 1.
Kapitanovka (Sovetio)
15721 *Heraŝĉenko V.*, Ŝevĉenkovsk. okr., sukeraĵisto.
Karlsbad (Ĉeĥoslovakio)
15558 *Chudoba E.*, Rosenbühl 296, Fischerrn, komizo.
Karlsruhe (Badeno, Germanio)
15652 *Welward L.*, Adlerstr. 44/3, studento.
Karsak-Paj (Taŝkent ĵ. d., Sovetio)
15716 *Babanin N.*, Dĵusali 35, kv. 2.
Kazan (Sovetio)
15569 **Kiseleva V.*, Podluĵnaja (35) 57, instruistino.
15568 *Saper D.*, Komleva 159, bibliotekisto.
15567 *Ŝeremuk A.*, Volĵska Odnostoronka 32, laboristo.
15566 *Terentjev P.*, Popereĉnaja 2-oj gori o kv. 4, zoologisto.
Kazatin (Sovetio)
15923 *Prijomov S.*, str. de Vorovskij 32, pentristo.
Kerĉ (Sovetio)
15667 *Filatov-Kurnyŝov J.*, Leninskaja ul. 19, kv. 4, kudraĵisto.
15666 **Kraŝeninnikova R.*, ul. Sverdlova 3.
Kiev (Sovetio)
9248 *Braginski J.*, Pariĵskoj Komuni 6/24, lernanto.
15695 *Torjevski J.*, Peĉersk. Anosovska str. 8/10.
Kioto (Japanio)
15939 *Akio Kojama*, Hirokooĵi-sagarn, studento.
15942 *Maluda Masao*, Yosida-Usinomiya Tyô 26, stud. med.
15764 *Narita Riuĵi*, Dooŝiŝa Universitato, Karasumaru-Imadeagaŭa, studento.
Kirsanov (Tambovsk. gub., Sovetio)
12308 *Marmolaev S.*, ĵel. dor. stancia 9, elektromuntisto.
Klatovy (Ĉeĥoslovakio)
15872 *Polivka J.*, 232/3, oficisto.
Koĥma (Iv.-Voznes. gub., Sovetio)
15707 *Tumanov A.*, Krasnaj-Oktjabr. 4-a str. 37, laboristo.
Konotop (Sovetio)
15904 *Rudenko V.*, Proletarskaja 90 d. ĉ. Ĵidĉenko.
Krasnodar (Sovetio)
15571 **Lokteva O.*, Krasnaja 1, Medtenika lernejo.
Krasnoufimsk (Sovetio)
7648 *Korjakovcev V.*, Internacionalnaja 90, lernejestro.
9694 *Vladimirov V.*, Leninskaja 66, konduktoro.
Kremenĉug (Sovetio)
15847 *Aleksienko I.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15852 **Antonova D.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15851 *Avramcuk V.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15804 *Barkovŝkij M.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15810 *Butenko A.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15825 *Ĉeĉitko P.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15822 *Ĉeredniĉok V.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15823 **Ĉernonog N.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15824 *Ĉesnjak P.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15954 *Dereza S.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15951 *Didok J.*, Vesjolaja 2/2, laboristo.
15963 **Dinecj V.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15955 **Dovbnja V.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15830 *Gravovij G.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15812 *Grivenko I.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15826 *Grjazkij P.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15961 **Iŝĉenko E.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15802 **Izgur D.*, Uĉiliŝĉnaja 6/5, lernantino.
15801 **Izgur L.*, Uĉiliŝĉnaja 6/5, studentino.
15819 *Ĵiteckij K.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15956 **Kapustjanskaja N.*, Ped. Teknikumo, studentino.
15814 *Karpenko P.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15828 *Kriŝan M.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15952 **Kuĉerova V.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15821 **Kulinskij A.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15959 **Kumejskaja A.*, Ped. Teknikumo, studentino.
15960 *Lisenko A.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15816 *Litvinov V.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15848 **Martjukova V.*, Ped. Teknikumo, studentino.
15827 **Miroŝkina N.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15834 *Molokov-Jurskij P.*, Ped. Teknikumo, instruisto.
15835 *Molokov-Jurskaja E.*, Pedagogia Teknikumo, instruistino.
15807 *Movĉan M.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15850 **Nestulo, G.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15843 *Nikiforov N.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15829 *Norenko I.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15808 *Ovĉarenko I.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15820 **Panĉenko G.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15849 *Pinĉuk A.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15957 *Plaĥotnik M.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15832 *Polvnjev N.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15853 **Postika K.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15805 **Potjaka M.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15817 *Povisenko G.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15845 *Rudenko D.*, Pedagogia Teknikumo, studento.
15949 **Salimen H.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15950 **Salimen M.*, Pedagogia Teknikumo, studentino.
15806 *Samojlenko P.*, Pedagogia Teknikumo, studento.

(Daŭrigota)

KIEL FONDI FERVOJISTAN SEKCION ĈE SAT

La fervojistojn tre interesu la sorto de l' neŭtrala I.A.E.F. (Internacia Asocio de Esp. Fervojistoj). Kvankam socialisto, mi tamen sopire atendis ties organon "La Fervojisto", redaktita de K-do Puhalo, ĉar la fervojistaro ne disponas pri alia esp. bulteno, krom sporade ekzistantaj naciaj, kia ekz. la "Hispana ligo de Esp. Fervojistoj", eldonita en Madrid. Kelkaj fervoj. fakgazetoj nacilingvaj aperigas esp. artikolojn (*Signalen*, Svedio!). Tiaj unuopaj faktoj instigas al pledoj k sugestoj. Estas demando, kiel la tutmonda esp. fervojistaro unuiĝu. Ĉu per SAT aŭ I.A.E.F.? La solvo ne estas plenumebla sen intertrakto k funda diskutado. La VII-a SAT-kongreso en *Lyon* kolektis areton da fervojistaj SAT-anoj, k jam la fakkunsido dum la VIII-a en *Göteborg*, kiun prezidis nia K-do E. Eriksson, kunigis pli konsiderindan aron da esp. fervojistoj el div. landoj. La debato estis malvigla. Montriĝis la sola demando: Ĉu akceli I.A.E.F. k ties organon. Ŝajnis, ke en SAT ne troviĝas pioniroj, por krei ferv. sekcion, similan al junulara, liberpensula k ceteraj sekcioj. Por interesi pri la estonta laboro, ni devas pristudi jenajn taskojn: Ĉu fervojista sekcio baziĝu sur fundamento de landaj fakgrupoj, el kiuj estu ĉerpitaj la plej spertaj k fervoraj K-doj por gvidado de ferv. sekcio de SAT, aŭ ĉu individuaj SAT-anoj formu sekcion? Mi persone klopodas celi al evoluo de citita sekcio. Ĝi nerefuteble postulas stokon, kiu nur povas esti kreita per fakgrupoj inter la landaj organizoj. Sed tio ne estas paŝo ĉiam farebla, pro multaj kialoj. Unue, fervojistoj ofte ludas rolon en la gvidado de lab. esp. grupoj en la provinco. Forŝiri ilin signifus detrui la propran kreaĵon. Por ne embarasiĝi ni rifuĝas al memhelpo, t. e. dividi la membrojn en aktivajn k administrajn. Aktivaj estu tiuj, loĝantaj en urboj, kie la lab. grupoj estas sufiĉe vivkapablaj, k izole loĝantaj K-doj en la provinco. Administraj estu, kiuj okupas funkciojn en lab. esp. rondoj de la provinco; ĉi-okaze estu elektata *peranto* fakgrupa, kies tasko estu, raporti unufoje dum monato al la estraro de ferv. fakgrupo pri loka esp. movado k propagandi esp-on inter fervojistaro. La antaŭtagon de landa liga plenkunveno kolektiĝu la perantoj k estraranoj fakgrupaj en sama loko, kie okazas la plenkunveno k prilaboru la estontajn taskojn. Unu renkontiĝo de landaj esp. fervojistoj ĉiujare okazu. Tiun partoprenu ankaŭ eksterl. reprezentantoj por pli facile solvi problemojn ĝeneralajn. Grava neceso laŭ mia vidpunkto estas, krei interŝtatan korespond-fakon por esp fervojistoj, kiu dediĉu sin al faka interkonsiliĝo. Por tiu celo funkciu en ĉiu lando kapabla k fervora K-do. Fidinda K-do zorgu pri ferv. paĝo en *"S-ulo"*, kiun la X-a SAT-kongreso alportu.

Miaj linioj veku pristudon k meditadon, kiel prosperigi la ideon de esp-o inter la tutmonda fervojistaro. Tiun taskon plenumu la fervojistaj SAT-anoj. *Josef Zink (9437).*

Pri skribado de propraj nomoj

En n-o 280 K-do Lojnbak (I. H. Leunbach) proponas diskuton pri skribado de propraj nomoj. Lia propono skribi almenaŭ unufoje en ĉiu n-o per esp. literoj la nacilingvan elparolon (proksimuman, sed kiom eble plej proksiman, do kompreneble kun akcento: Voltēr, Volter aŭ Voltér) ŝajnas al mi la plej racia solvo. Laŭ la Statuto SAT celas i. a. instrui k klerigi siajn membrojn. Do oni prave povas postuli, ke "S-ulo" instruu siajn membrojn, kiuj plej ofte nur scias unu lingvon, k pri la elparolo k pri la ortografio de propraj nomoj fremdlingvaj.
Paŭlo Nergor (Paul Neergaard), 15 326.

ESPERANTISTA TRAKTORO

tio estas la plej bona eblo, kiel ni lab. esp-istoj povus videble montri niajn simpation k amikecon al Sovetio. Tial kun ĝojo mi legis la artikolon de K-do Demidjuk, kiu montris, vojon, kiel ni povas efektivigi tion. En kunveno de lokaj LEA-anoj k SAT-anoj ni priparolis tiun ĉi temon k venis al unuanime akceptita decido: La Gek-doj de München per speciala listo monkolektas inter si k inter amikaj rondoj por *Esperantista Traktoro*. En la diskutado nin gvidis la faktoj, ke ne nur imperialistaj ŝtatoj kaŝe aŭ malkaŝe laboras kontraŭ Sovetio, sed ankaŭ en la lasta tempo la Roma Eklezio komencis prediki "sanktan militon" kontraŭ Sovetio por tiel profiti je la disfalo de la iama ortodoksa eklezio. Ni lab. esp-istoj havas motivojn por bari al tiaj reakciaj ondoj. Tial ni ne staru flanke, sed helpu per niaj fortoj. Tiel ni fortigas al la sovetiaj Gek-doj ilian entuziasmon por ĉiuj laboroj kulturcelaj. En tiu ĉi afero por ni ne estu demando: ĉu socialdemokrato aŭ senpartiulo. Ni havu la konvinkon, ke sovetia laborularo en sia ega laboro je konstruado de socialisma sociordo bezonas ankaŭ la helpon de laboristoj en tuta mondo. Ni ĝoju, ke ni per *Esperantista Traktoro* havas pluran eblon por montri la unuecon de lab. esp-istoj! *Konrad Deubler (München).*

Stato de F.E.O.[1] okaze de ĝia X. Kongreso

La X-a Kongreso de l' franclingva LEA okazos de 19.—21. aprilo en Sen-Deni (Saint Denis), granda laborista urbo apud Parizo. La 19-an de aprilo la tiea grupo, kun helpo de la Pariza, organizos propagandan noktfeston.

La nunjara raporto montras gravajn variojn en la membronombro, precipe en kelkaj regionoj: ni perdis niajn membrojn en 9 departementoj, sed aliflanke ni akiris novajn en 16 dep., kie en 1928 ni ne havis membrojn. La perdo estas ĉefe grava en dep. Ŝer (Cher), pro foriro de agema K-do, k en Belgio, pro tendencaj disputoj — diras la sekcia sekretario. Male, en Pariza regiono ni akiris ĉ. 100 novajn membrojn. Tial, malgraŭ vigla propagando fare de la estraro k de kelkaj grupoj, la fina rezulto estas jena: 783 membroj (826 en 1928). Tamen nia movado ja progresis, ĉar SAT akiris lastjare en Francio, Belgio k Svisio ĉ. 80 membrojn. Malfacile estas ĝuste bildi al si la situacion, tial ke K-doj aliĝas al SAT k ne al FEO, k inverse.

Ni citu ankoraŭ kelkajn nombrojn, kiuj resumas la faritan laboron. La Federacio presigis 25 mil flugfoliojn por 1. majo. Preskaŭ ĉiuj estis disdonataj. La perletera kurso ricevis 290 informpetojn (360 en 1928); preskaŭ ĉiuj venis de la legantoj de l' gazeto "Monde" sekve de propagandaj artikoloj. 230 K-doj aĉetis la kurslibron aŭ enskribiĝis ĉe la kurso; 190 sekvis ĝin. La informservo sendis 98 tradukojn; ĝi registris 160 enpresojn en 22 gazetoj. El nia stoko eliris jena kvanto da libroj: 2144 ekz. de la plena kurslibro "Cours Rationnel" (1388 en 1928); 1350 ekz. Elementa Kurso (4800 en 1928); 328 ekz. Aldono al Racia Kurso (383 en 1928); 328 ekz. "La Langue Internationale" de E. Lanti (378 en 1928) kies 2-a eldono baldaŭ aperos. La mona stato de la Asocio estas bona. —
La sekr. *H. Kaŝon (Cachon).*

[1] Laborist-Esp-ista Federacio (Fédération Espérantiste Ouvrière) = LEA por franclingva teritorio.

RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

M. Ljubin, Ruĝa Aŭroro. 30 pĝ. Form. 11,5×17 cm. Eld.: *Balkana Laboristo*, Sofia, 1930. Pr.: 0.50 mk. g.

Malatentante pri la Eldona Kooperativo de SAT k tiurilataj SAT-kongresaj decidoj, la supre menciita gazeteldonejo aperigas memstare tiun serion da originalaj poemoj verkitaj kun talento, vervo k flua ritmo. Ĉe la preso lingva regulo estas malatentita: ke la forlasebla en versoj finaĵo *o* devas anstataŭe esti signata per apostrofo. La presmaniero "del" (anst. de l') estas perforto. Da eraroj ni notis: *Multfoje* "o" anst. "ho", revolto anst. ribelo (p. 9), koĉmaro (!), p. 5, anst. inkubsonĝo, Molloho (!) anst. moloĥo (p. 7), ŝancelas sin (!) la mur' (anst.: ŝanceliĝas), p. 14, armigas sin (anst. armas sin), p. 15, ŝturmo (anst. ŝtormo), p. 16, horore (anst. terurege), p. 24.
N. B.

L'Accumulation du Capital d'après *Rosa Luxembourg* suivi d'un aperçu sur la discussion du problème depuis la mort de Rosa Luxembourg par *Lucien Laurat* (La Akumulado de la Kapitalo laŭ R. L. kun resumo de la diskutado pri la problemo depost la morto de R. L. de L. Lora). Eldonejo: *Librairie des Sciences sociales & politiques,* 31, rue Jacob, *Paris.* Formato: 14×22 cm. 196 pĝ. Prezo: 20 fr. fr.

Ĉu ni malkaŝu sekreton?... La aŭtoro de tiu grava verko estas malnova, bone konata SAT-ano, Lucien Revo, kiu ne malofte skribis pri Roza Luksemburg en *Sennaciulo* k en la malnova *Sennacieca Revuo.* Tiu malkaŝo maldevigas nin recenzi la verkon; ĉiu malnova leganto de la SAT-organoj ja bone scias, ke neniu estas pli kompetenta ol Revo por priparoli "luksemburgismon". Cetere ni havas kiel principon ne recenzi detale nacilingvajn eldonaĵojn k sekve povas nur rekomendi la legadon de tiu verko al ĉiuj franclingvanoj. Samokaze ni diru nian ĉagrenon, ke esp-o ne ankoraŭ akiris sufiĉan disvastiĝon por ebligi, ke tiaj verkoj estu eldonitaj de SAT.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

L'Union des Travailleurs, St. Etienne, jan., feb., koop. movado en Svedio (1928); *Juna Leninano,* Saratov, 22. 2., La danko de l' patr. (274), *Rahva Sona,* Tallinn, 12. 1., kion bezonas la hundo (274), *O Povo,* Lisboa, 8. 10. 29, let. el Anglio (260), 28. 9., viktimoj de laboro (257), 30. 9. tago de lab. gazet. (238), 13. 11., tutm. interdep. (262), 29. 1., la mondo estas unuo (275), 11. 2., kapitalistoj malatentas landlimojn (275), 7. 2., senn. alumeta trusto (270), 5. 2., pri kristnasko (276), 8. 2., eldonind. k legemo en Jap. (261), 10. 2. k 18. 2., Kozakoj (261, 263), 18. 2., spertoj de radiotelegr. (274).

Represis el "La Lern.":

O Povo, Lisboa, 26. 9. 29, la unua poŝtkarto (8), 17. 2., la blasfemo (1).

Priesper. artik. k notojn enhavis:

O Seculo, Lisboa, 6. 8., 28. 8., 3. 9., 10. 9., 18. 2., *Diario de Lisboa,* 19. 8., 18. 2., *Rahva Sona,* Tallinn, 13. 1., *Vaba Maa,* Tall., 7. 2., *Pärnu Rahva Sona,* preskaŭ ĉiusemajne kelkfoje, *Pärnu Paevahlet, Pärnu Vaba Maa* k *Pärnu Postimees* (burĝaj), preskaŭ ĉiusemajne, *Signalen,* Stokh., 27. 2., *ITF-Bulteno,* feb. (rubr.), *Zaĉistka,* Kiev, 31. 1., *Kieva Pioniro,* 10. 1., 25. 1. (kurso).

Peresper. materialon enpresis:

L'Ecole Emancipée, Saumur, 2. 3. (du artik.); *Zaĉistka,* Kiev, 11. 1., 31. 1.; *Selanska Gaz.,* Kiev, 15. 2., 13. 11.; *Rahva Sona,* Tallinn, 10. 1., 11. 1. (rap. E. S. 90, 91, 94); *O Povo,* Lisboa, 15. 11. 29.

NIA POŜTO

13 302. — Ni intencas aperigi vian kanton okaze.

11 297. — Ni transsendis al Esp.-Servo.

29 (Novj.). Via artikolo en venonta n-o. Por la grupkliŝo bonvolu pagi al la administranto 2.50 dol.

L. B., Leeds. — Via manuskripto aperos. *Red.*

KORESPONDADO

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0.80 mk. g., ĉiu plia linio 0.50 mk. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago. L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo. Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

AŬSTRIO

— 31 j. fraŭlo seruristo ankaŭ muzikanto petas helpon, por ke li ricevu laboron, precipe en Sovetio. Adr.: Franz Wallner, *Reichraming.* — Resp. nepre garantiata.

BRITIO

Adresŝanĝo. — K-do E. Beever (1127) loĝas nun: 224 Spen Lane, *Gomersal ap. Leeds.*

K-do H. S. Cenney, 80 Haggerston Road, Dalston, E. 8, *Londono,* kĉl pri ĉ. temoj.

GERMANIO

— 10 Gek-doj de la lab. esp. grupo "Ni estu fratoj", Lessingstr. 17, *Nowawes,* kĉl pri ĉ. temoj, L, belaj PK, PI, bfl, il. gaz. Sendu ankaŭ polit. afiŝojn. Resp. garantiata.

K-do F. Meier, Fritz-Reuter-Str. 27, *Rostock,* kun eksterl. vizitontoj de la Viena Olimpiado 1931.

K-do Philipp Strott, Sackgasse 8, *Schlüchtern,* Bez. Kassel, kĉl pro pens-interŝanĝo.

K-do Daniel Fiŝer (15 749), Pirmasenser Str. 94, *Kaiserslautern/Pfalz,* serĉas serioz. koresp-adon kun sud-landaj Gek-doj. L, PK, PI. Certe resp.

NORVEGIO

K-do Ole Stenseth, Prezidentgt. 6, *Oslo,* kĉl. Gek-doj pri ĉ. temoj.

POLIO

— 15 Gek-doj koresp. kĉl (krom Sovetio). Resp. garantias: K-doj 10 750 k 13 529. Adr.: Stow. Esp. "Laboro", ul. Zachodnia 66, *Lodz.*

K-do Max Ŝpetrik, Lipki 29, *Berezno,* Wolyn, kĉl pri politiko, ekonomio, ateismo, virinismo, interŝ. scienc-prilibrojn en pola, rusa, ukraina, juda k germ. lingvoj.

SOVETIO

K-do Pankov (junkom-isto, teknikisto), "Esperanto", Palac Praci, kv. 63, *Ĥarkov,* kĉl pri teknik. problemoj k kom. jun. movado, L, PK, PI, gaz., ktp. Nepre resp.

K-do G. Rudomjotov, Str. Krasnoarmejska 29, *Minusinsk,* Siberio, kĉl pri ĉ. temoj, L, PK, PI. Por lernantoj mi bez. koresp-antojn.

— *Fotoamatoroj!* Por fotoamatora gazeto "Soveta Foto" mi proponas interŝ. fotojn pri aktualaj k. a. t. — Adr.: B. Vdovenko, Oktjabrskaja 26, *Moskvo-Lublino.*

— Grupo de Internacia Laborista Ligo, Taganskaja 58, *Moskvo — 4,* Klubo de Buĥarin, proponas serioze koresp. pri aktualaj k. a. t., fotoj, gaz. Resp. garant.

K-dino D. Lomakina (19 j.), 8 Sokolniĉeskaja ul. 10/2, kv. 7, *Moskvo — 14,* kĉl pri ĉ. temoj, gaz., PI.

K-dino Ira Semenova (23 j.), Niĵne-Krasnoselskaja ul. 28, kv. 64, *Moskvo — 5,* kĉl pri ĉ. temoj, PI, gaz.

— Kiu volas havi interesan koresp-adon? Do skribu! Adr.: *Krasnodar,* Krepostnaja 28, Teodoro Klapcov.

— Mi nenion promesas krom akurata resp. al iu ajn temo. Adr.: Bazilo Novikov (metalisto), Novaja 75, *Krasnodar.*

K-dino K. Timofeeva (17 j.), 1 — Krestovskij per. 13, kv. 2, Moskvo — 41, kĉl pri ĉ. temoj.

K-do N. Surovcev, Krochmalievskij per. 9, *Ĥarkov — 4,* kĉl, L, PI, PM, ĵurn., esp. libroj.

K-do V. Ĥilitinskij, Moskalevka 55, *Ĥarkov — 4,* pri ĉ. temoj kĉl. Interŝ. fotojn. Resp. garantiata.

K-do Ĥvorostin (stud. de universitato), 6 linia 47-a kv. 5, *Leningrad, 4, V. O.,* kun Germanio, Aŭstrio, Francio.

— Studentoj de Universitato, *Leningrad, V. O.,* Universitato, kĉl, precipe kun studentoj k gejunuloj.

— Pri revolucia movado k vivkondiĉoj de lab-istoj ĉl. koresp. Nord-kaŭkazia Komitato de IRH. Skribu multnombre! Adr.: *Rostov/Don,* Poĉtov. jaŝĉik 82, Esp. Komitato, por IRH.

— 20 instruistoj koresp. kĉl, L, PK. Resp. gar. Adr.: Ukrainio, *Kremenĉug,* Domo de Klerigado, BRO.

SUD-AFRIKO

Adresŝanĝo. — K-do Zamuelo Plaks (10 277), 62 Sackville Str., *Cape Town* (antaŭe 13, Clive Street).

SVEDIO

— 10 junuloj dez. koresp. por sin perfektigi en esp. Adr.: K-do Erik Englund, Vidon, 638, *Skoghall.*

K-do Thelma Gunnersen, Vret 238, *Sundsvall,* interŝ. PI kun arta valoro, kĉl, L, pri literaturo, arto k. a.

— 17 jara junulo koresp. kĉl pri ĉ. temoj. Adr.: Fritz Bergström, Lunden 459, *Skoghall.*

— 20 gelernantoj koresp. kĉl, L, PI. Resp. gar. Adr.: "Esperanto", Soc. dem. ungdomsklubben, Skolgatan 8, *Malmö.*

SVISIO

K-do Ch. Roth, Beau-Site 22, *St. Imier,* kun K-dinoj pri socialaj, ateistaj ktp. temoj. Certe resp.

ĴUS APERIS:

Paul Fruictier

Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto

reviziita kaj kompletigita de
S. Grenkamp-Kornfeld

Formato: 15½×23½ cm — 200-paĝa

La plej ampleksa
kaj la plej malkara el la esperantaj
gramatikoj

Prezo: 5.00 fr. sv.
Kartonite: 6.50 fr. sv.

ELDONEJO: ESPERANTISTA VOĈO
Jaslo (Pollando)
HAVEBLA ĈE SAT (Mendoj el Sovetio ne plenumeblaj)

K-do Walter WREDE

(advokatskribisto), Christophstr. 9, b. R. Floss, *Limbach/Sa.*, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.
Respondo garantiata!

Atentu, Ŝakludantoj!

Sekcio de ŝakanoj en Centra fervojlaborista klubo de Oktobra fervojo en Leningrado proponas ludi je ŝako per esperanto kun gelaboristoj el ĉ. l., ĉu kolektive, ĉu individue k ankaŭ serĉas serioz. korespondantojn pri ĉi tiu temo.
Sovetio, *Leningrad*, Tambovskaja, 63, Centra klubo de Oktobra fervojo, sekcio de ŝakanoj.

LABORISTAJ KORESPONDANTOJ

DE ĈIUJ LANDOJ!

Gazeto *"Gudok"* ("Fajfegilo") — organo de Centra Komitato de tutsoveta fervojista profunuiĝo, havas 73 000 laboristajn korespondantojn, forte ligitajn kun la gazeto, kaj estas ĉiutage legata de miliono da sovetaj fervojistoj, kiuj interesiĝas pri vivo kaj batalado de siaj eksterlandaj fratoj fervojistaj kaj aliaj laboristoj.

Redakcio de *"Gudok"* vokas eksterlandajn laboristojn sendi notojn, leterojn, artikolojn, skizojn, fotojn, flugfoliojn ktp. Jen estas fundamentaj temoj, interesantaj la sovetan laboristaron: 1. Daŭro de labortago (por viroj, virinoj kaj junularo); 2. Buĝeto de laboristo, laborpago, loĝejkondiĉoj, socia asekurado; 3. Laborkondiĉoj; kapitalisma raciigo; 4. Kiel pasigas laboristo sian libertempon — ripozdomoj, kluboj, sportejoj ktp.; 5. Agado de revoluciaj kaj reformemaj sindikatoj (prof-unuiĝoj); 6. Strikoj, manifestacioj, revolucia agado; 7. Persekutado al laborista movado (policaj traserĉoj, arestoj, malpermeso de gazetaro); 8. Laborista gazetaro (presataj kaj mur-gazetoj, eldonado kaj disvastigado ilia); 9. Laboro de IRH, Asocioj de Amikoj de Sovetio; 10. Senlaboreco, "malsatulmarŝoj", buĝeto de senlaborulo; 11. Virina movado — agado de burĝaj, reformemaj kaj revoluciaj organizoj; 12. Junulara kaj infana movado — burĝaj kaj revoluciaj organizoj, laboro de junkomunistoj; 13. Batalo kontraŭ faŝismo; 14. Kion pensas laboristoj pri Sovetio, pri kvinjarplano ktp., ktp.

Speciale sendu materialon al diversaj memortagoj kaj revoluciaj datrevenoj (ekzemple — virina tago, Pariza Komuno (tago de IRH), 1-a de Majo, Oktobra Revolucio k. a.). Tre volonte ni akceptos la leterojn de grupoj kaj kolektivoj de laboristoj.



Redakcio de "Gudok" ĉiam akurate kaj ĝustatempe respondas al siaj gekorespondantoj kaj petas demandi pri ĉiuj interesantaj ilin temoj pri Sovetio. Ĉiu ricevos respondon.

Leterojn ankaŭ oni povas sendi en naciaj lingvoj. Ĉion adresu al

REDAKCIO DE "GUDOK", OTDEL MJEĴRABSVJAZI, UL. GERCENA, ĤLINOVSKIJ TUPIK, 8. MOSKVO (SOVETIO)

HEROLDO DE ESPERANTO

la sendependa semajna ĵurnalo esperantista, aperanta jam de dek jaroj en taggazeta formato (kvaronjara abonprezo 3 mk. g, 3.75 fk. sv. ktp.), eldonis lastatempe valorajn librojn:

TOLLER: La Hirundlibro. Kun du ksilografaĵoj. Prezo bind. 2.65 mk. g.
REMARQUE: En okcidento nenio nova. La tutmonde legata romano. Broŝ. 4.40 mk. g.; bind. 6.60 mk. g.
A. TOLSTOJ: La morto de Danton. Tragedio. Prezo broŝ. 1.75 mk. g.

La prezoj enhavas la sendkostojn. Senpagan Katalogon de Libroj kaj senpagan prov-ekzempleron de "Heroldo" sendas laŭdezire la administracio de

HEROLDO DE ESPERANTO, KÖLN, GERMANLANDO
BRÜSSELER STR. 94.

Librekspedejo de BK SEU

havas grandan kvanton da sovetiaj esperantaj ĵurnaloj, "Sennaciulo", "Liberpensulo" k. a. — Ĝi sendos ilin interŝanĝe kontraŭ lastjaraj laborist-esperantaj eldonoj.
Broŝuroj: "Gromada" (Okcidenta Blankrusio), trad. D. Snejko kaj "Unuiĝo de Ligilo en USSR", trad. Ĵavoronkov ni sendas kontraŭ 3 respondkuponoj. Adresu ĉion: *Minsk*, Poŝtkesto 33, BK SEU. Ni ankaŭ havigas aliajn SEU-eldonojn.

10 gelernantoj dez. koresp.

kĉl. pri ĉ. temoj, sed nur per PI. Respondu al: K-do Gosta Jönsson, Grödby 7, *Hakanryd* (Krist. lan.), Svedio.

Dum la FEO-KONGRESO en St. Denis (19. 21. aprilo 1930)

okazos ESP. EKSPOZICIO. Sendu materialon, PI, let., ĵurnalojn laboristajn, neŭtralajn, burĝajn ktp. Ni respondas al ĉiuj.
Laborista Esperantista Grupo, 4, strato Suger, *St. Denis.*

Fabrikaj komjunula k IRH-ĉeloj, pionir-taĉmentoj k laborista klubo dez. koresp. kun la samaj organizoj alilandaj. Adr.: USSR, *Keret*, Karelio, L/u, N. 42, P. Jasinski.

La 16.—22. aprilo ni okazigos
EKSPOZICION KUN LUMBILD-PAROLADO
por konvinki la lab-istaron pri la utilo de esp. Tiucele ni ankoraŭ bezonas materialon. Helpu Gek-doj! Ĉiu sendinto ricevos bildon de nia bela "Nekarvalo". Adr.: K-do Friedrich Rau, Rathausstr. 36, *Neckarsulm/Wttbg.*

K-DO LONDARI GEORGO

deziras eventuale daŭran korespondadon kĉl. pri ĉiuj temoj L, PK, PI, PM k ankaŭ organizi ŝakturniron laŭ koresp. Nepra k senprokrasta resp. Adr.: *st. Korenevo, M. K. V. ĵel. dor. Blagodatjenskij Saĥzavod, Lgovskogo okruga, Sovetio.*

ENHAVO:

	paĝo
Milita industrio	289—290
Kiu kaj kial likvidas preĝejojn en USSR?	290—291
La respublikŝirma leĝo	291—292
Kulturtaskoj	291—292
Kino-arto kaj arkitekturo	292
Tago el mia vivo	292—293
Diskutejo	293
Esperanto-Servo	294
Sennaciula Liberpensula Paĝo	295—296
Tra Esperantio	296—299
Korespondado	299
Anoncoj	300

Presejo: Peuvag, Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)